

La Rondo

The Australian Esperanto Monthly

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 12½\$ (aŭ 20 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 4\$.



Redaktoro: F. R. BANHAM, 2 Banchory St., Essendon, W.5, Victoria.

Adreso de A.E.A.—Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.

Kasisto: E. McKenzie, 117 Mitchell St., Northcote, N.16, Vic.

Vol. 12, N-ro 65.

MELBURNO.

Jan. - Feb., 1955.

BREAKING THE BABEL BARRIER

Enduring Profit and Plea sure for the Translator.

The intelligent translator not only improves his use of Esperanto, but also becomes more conscious of the subtleties of his own tongue, and learns to understand and logically render them into the I.L.

We too readily suppose that, scanning a book, we understand it perfectly. We seldom pause to search the real meaning or remark on a murky expression. Translating from the same book, however, you won't go far before you murmur: What does the author mean here?

This happens often, even in books or magazine pars which, through insufficient attention, one has on first reading taken as quite clear. The truth is that we subconsciously assume that we have reaped the whole sense, whereas we have merely gained a surface impression of the whole, enough to content our phlegmatic thinking. The rapid reader gains enough to give him the more or less defined scene or situation. Imagination provides the rest. Only when he goes to paraphrase or translate that page does he notice difficulty. This is almost inevitable in writings that treat of motives, behavior, states of mind and human relationships.

It may be due to the author's obscurity and incomplete treatment, but reader-intelligence is often lacking too.

The serious translator should read with concentration until he develops an instinct that will enable him to

share the mind of the author and in a sense read between his faulty lines. A translator is a "writing" interpreter. To interpret means to make clear, explain, truly set forth. No loose thinker can do that. To perfect their renderings world-famous translators such as the Maudes have studied deeply the personal lives and inner thinking of the men whose works they re clothed in other tongues.

Admittedly there are passages to which "as many heads" will give "as many interpretations," even where the diction is supposedly simple. Of "he was sometimes hard but never bitter" twelve translators gave differing perceptions of what was meant. The sense may be: "He was sometimes stubbornly angry but he never brooded maliciously over an affair." The despairing thought comes to one that only an intimate friend of Hardy could dare to translate with any confidence the bare words of Lord Cecil concerning him here.

Now try to translate: Drink ye all of it (be careful!); "After life's fitful fever, he sleeps well"; "Nothing is unclean of itself"; "Help thou mine unbelief"; "Fair Science frowned not on his humble birth, And Melancholy mark'd him for her own"; "I have not hastened from being a shepherd to follow thee" (Jer. 16: 15); John told Ben's son that he must help him. (Six senses.)

If you fancy you have caught something of the style of Zamenhof, try:

"What do you know that I don't know?"; now look at Job 15: 9.

Ever informing himself of the capabilities of Esperanto and the complications of an extremely subtle national language such as English, the persistent translator gains a truly liberal education. Such exercise of the brain results in an enlarged faculty for understanding and revealing the quickening ideas that lie yet obscure in our vast literature.

—F.R.B.

COUNSEL TO CAVILLERS.

After a masterly demolition of worn-out objections to Esperanto by pernickety pedants, Jean Bernard VALDOR in "L'Essor" concludes: "Instead of engaging in tedious, sterile discussions one should strive to summon up enough earnestness to devote to the study of the International Language but a quarter of the time given to national tongues. So doing, one would help to promote the greatest spiritual revolution the world has ever known."

Human thought, thus delivered from its chains (of multilingualism), would soar to heights unreachd ever before.

TRADUKA KURSO.

F. R. BANHAM, D.B.E.A., gvidas kurson por tradukantoj. En ĉiu monato li sendas Anglan pecon tradukotan. Ricevinte la tradukaĵojn, li prikomentas ilin kaj ilin resendadas al la kursanoj kune kun sia propra traduko kun notaro.

Ĉiu ano devus esti iom progresinta, kaj tial sufiĉe kapabla por verki simplan, korektan leteron en Esperanto. La celo de la kurso estas: provizi eliton da tradukantoj kompetentaj traduki, fidele kaj bonstile, tekstojn el la Angla en Esperanton en okazo de neceso.

La kotizo estas nur formala: dek ŝil. por 12 monatoj. Petu detalojn ĉe 2 Banchory Street, Essendon, W.5, Victoria.

MI VIDIS ZAMENHOFON!

Kiu en Aŭstralio, ekster nia bona amiko, s-ro Gottlieb, persone alvidiĝis al nia Majstro? Ni dezirus publiki liston de tiaj bele-dotitaj personoj, kies memoro certe estas riĉa je bonodoro pri tia neniam-forgesebla historia sperto.

Australia Kroniko

● MELBOURNE.—La jaro 1955 jam sufiĉe progresis, tamen oni ne povas pritrakti tiun sen aludo al la pasinta jaro, ĉar en la lastaj du monatoj de 1954 okazis du gravaj kunvenoj de Melburnaj E-istoj. La unua estis la 150a kunveno de Rendevo, kaj la dua estis kompreneble la Zamenhof-festo.

La Zamenhof-festo ĉi-foje okazis je la ĝusta dato kaj, dank' al F-ino Colwill kaj S-ino Ferenzi, en pli granda kaj pli bela halo. Ĉeestis pli ol 70 personoj, kiuj ĉiuj faris sian eblon por certigi sukcesplenan vesperon. S-ino Glenie prizorgis librostandon, dum aliaj virinoj pretigis refresajojn; kaj varia programo distris la ĉeestantojn. Bonvensalutojn parolis Prez. E. McKenzie. Dankon ni ŝuldas al la lernantoj de dua S-ino Ferenzi pro kant- kaj danc-programeroj. Esperanto-kantado de S-ro McKenzie kaj pianludado de S-ino Humphries estis aliaj ĝuidadoj. Prelego de S-ro H. Koppel, kun taŭgaj elĉerpitaj versoj, skizis la vivon de Karl Vanselow, "La Verdstela Trobadoro," kaj festparolado de S-ro Ken Linton, kiu priskribis la vivon de la Majstro, tre konvenis al la okazo. S-ro F. R. Banham anoncis pri la Pyke Memoriga Ekzameno, kaj S-ro W. J. Drummond disdonis diplomojn. Niajn gratulojn al S-ro R. Cecil, kiu gajnis la premion, kaj al F-ino E. Styles. Post bona manĝeto kaj gaja babilado eksonis "La Espero" kaj tiel finiĝis por la Klubo la jaro 1954, sufiĉe bona jaro, dum kiu ni gastigis multajn interesajn vizitantojn—transmaran S-ron Simpkins; el Canberra—S-ron Gamble, el Kvinslando—S-ron Parry; el Nowra, N.S.W. (aŭ ĉu el la maro?) S-ron Latimer, k.t.p. Tamen, kun bedaŭro ni devis adiaŭi la familion Leereveld, kiu translokiĝis al Tasmanio.

La Nova Jaro komenciĝis kontentige. Novan klason da lernantoj gvidas S-ro Burstin, kaj malgranda studrondo daŭrigas sian legadon kaj tradukadon, helpate de S-ino Koppel. Ĉeestis la unuan kunvenon du malnovaj s-anoj, S-ro Mills el Kvinslando kaj S-ro Sullivan, Melburno, kiuj malgraŭ longa neuzado de la lingvo sufiĉe bone kaj interese alparolis nin. Post la klasoj ĉiam sek-

vas interesa paroladeto. Gis 31/1/55, ni aŭdis F-inon Amy Godfrey pri ŝia Kristnaska migrado al Mount Wellington, S-ron Simpkins pri Orienta Afriko, demandaron inter S-roj Koppel kaj Simpkins, S-ron Burstin pri la ruso Khrushchev (Hruŝĉev), kaj diversajn raportojn de S-ro Koppel, inter kiuj estis longa interesa letero de S-anoj Leereveld.

RENDEVUO: La Novembra kunveno estis vera jubilea okazo, por kiu S-ro Koppel akceptis respondecon pri la programo. Li aranĝis bonegan variaĵon. De S-ro J. Gottlieb ni aŭdis viglan rakonton pri la lastaj tagoj de la Mondmilito en Hamburgo. "Psikologia Milito" (Japanlingva Radio-propagando de Radio Australia) estis la temo de interesa kaj kelkfoje amuza parolado de S-ro Oki. Aliajn humorajojn pri lingvoj provizis S-ino Koppel, sed speciala surprizo kaj nekutima sperto estis "Voĉoj el La Montaroj," magnetofona registraĵo, kiun, kunlabore kun S-ro R. Harry en Genevo, S-ro Koppel havigis el Eŭropo. La "voĉoj" inkluzivis tiujn de S-ro Harry mem, Prof. D-ro E. Privat kaj S-ro Hans Jakob. Bedaŭrinde la lasta, kiu estis parolata en halo inter multaj homoj, ne estis sufiĉe bone distingebla, sed la parolado de Prof. Privat, en la vortoj de S-ro Harry, estas "vera juvelo." Dankon al S-ro Koppel, kiu ĉiam havas novajn ideojn kaj domaĝas neniajn penojn por efektiviĝi ilin! Dankon ankaŭ al S-ro Harry kaj al S-ano Milligan el 3UZ, kies magnetofono kaj funkciigo ebligas tiajn spertojn en la Klubo.

Ĉe la Januara kunveno, S-ro Otens interese rakontis pri vizito al Nederlando post kelkvara vivado en Aŭstralio.—O.B.S.

● **CANBERRA.**—Ne multaj aktivaj membroj restas en Canberra sed la klubo aranĝis sukcesan dancon en 9 Dec. Ni akiris profiton de pli ol £30 kaj tre dankas al nia sek-io, Noel Gamble, kiu faris preskaŭ la tutan laboron. Plua sukceso elveninta el la afero estis propaganda—la kantado de S-ino Torr en Esp-o de la nuntempa "Hit of the Week," nome "Kapelo en Lunlumo." Tion priskribis dufoje la loka taggazeto, "Canberra Times," kaj ankaŭ la Sidneja "Daily Mirror," en kiu ankaŭ aperis fotografo de la kantantino ĉe mikrofono.

17 Dec. ni havis monatan kunvenon kaj diskutis aferojn rilatajn al la Kongreso 1956-a. Tiom multe ni diskutis, ke ne restis tempo por la distra parto, en kiu ni intencis legi poemojn, k.t.p. Ni bonvenigis S-inon Hall, kiu revenis post longa malsano.

Pro la feritago fine de Jan., la januara kunveno okazis ne en la fina Vendredo sed la antaŭlasta—21a.

7 Jan. klubanoj aŭskultis sonstrion kun la voĉoj de Ralph Harry, D-ro Privat kaj Hans Jakob. Ĉar la kunveno okazis ne en la kutima vespero, nur kvar povis ĉeesti.

La Jan-a kunveno okazis la 21an, ĉe "Riverside". Ni decidis kunveni de nun dufoje ĉiumonate, anstataŭ unufoje kiel ĝis nun. Tio plifaciligos kondukadon de klasoj, ankaŭ permesos pli da tempo por parolekzerco de ĉiuj, kaj pli mallongigos la aferkun-sidojn.

Je tiu ĉi kunveno, ankaŭ, S-ino Torr legis poemon, kiun ŝi verkis; en ĝi ŝi lamentas la ĝenojn de komencanto studanta la "akuzativojn".

Poste ĉeestantoj ludis jetkuban ludon (de la Serpentoj) kaj Stuparoj tipo), kiu povis paroligi ĉiujn, pli sukcese ol antaŭe uzitaj metodoj. Kvankam la ludkarto estis presita angle, ĉiuj devis paroli nur Esp-e, ĉar la prez-o, S-ro Torr, estante E-isto, "ne povis kompreni la anglan." Ni rekomendas tiun rimedon por paroligi memkonsciulojn!

10 Jan. ni ĝojis gastigi Ge-srojn kaj F-inon Linton, survoje hejmen de Sidnejo.—HARRY TORR.

● **ADELAIDE.**—Oficialaj kunvenoj de la loka klubo sub aŭspicio de la universitato W.E.A. finiĝis en Novembro. La finan kunvenon ĉeestis Ge-sroj F. R. Banham el Melbourne, kiuj feris en Adelaide. Iom antaŭe favoris nin per vizito ankaŭ Ge-sroj S. L. Parry el Brisbane.

La grupo festis la Zamenhofan vesperon (15 Dec.) ĉe la hejmo de F-no Kempson, kie la grupo ankaŭ kunvenadis unu-dufoje monate dum la jaro. Kiel dankesprimon pro tiu gastigado, grupanoj donacis al F-no Kempson belan tablotukon punteksitan. (Eble per estontaj vespermanĝetoj ni tute eluzos ĝin.)

La klubo kunvenas ĉe A.W.U. Hall, 15 Flinders Street. Ni devis forlasi la komfortan Y.W.C.A.-ĉambiron.—H.W.F.

● **PERTH.**—En Jan. vizitis nin multaj E-istoj de aliaj ŝtatoj. La loka E-Ligo kore gastigis ilin. Inter la vizitantoj estis F-no Hope Crampton, kiu vojaĝis por partopreni en la E-a Mondkongreso ĉe Bologna. D-ro F. Williams (Melb.) partoprenis en la kongreso de Kvakeroj en nia urbo, kaj multaj el ni ĝuis lian kompanion. Plezure ni renkontis ankaŭ sam-ojn Sydney Grant, Robert Nicholson, C. P. Winchcombe.

Nia kasisto, F-no Longson, revenis el turisma vojaĝo en Japanujo, kaj je nia monata kunveno ŝi rakontos pri sia renkonto kun Japanaj E-istoj.

Novaj klasoj por komencantoj en Feb-o. Jen la kandidatoj, kiuj sukcese eltenis la ekzamenojn: Altgrada klaso: Dorothy Leack, Violet Fidock. Duagrada: Rosemary Ladyman, D. Bennett, E. W. Cameron. Unuagrada: G. McGeecham, Elizabeth L. Roberts, Claire K. Collins.—A.E.

● **SYDNEY.**—Bondezirojn al S-ino Henderson, kiun ni pli bone konis kiel Vera Matasin. Je la 18a de Decembro, en bela kaj solena ceremonio ŝi edziniĝis. Ni deziras el la duo ĉian feliĉon.

Plezure kaj profite estis, aŭdi per magnet-aparato, paroladetojn de eminentaj Esperantistoj D-ro Privat, S-ro Jakob, kaj S-ro Harry. Dankon al la kunlaborintoj por la oportuno aŭdi en tiu ĉiantipoda angulo, voĉojn de samideanoj el la vasta mondo.

Kaj riĉigaj ejoj de la Mondkongreso en Haarlem atingis nin pere de Ges. Clarkson (el Novzelando), F-ino Longson (W.A.) kaj S-ino Craie (Skotlando), kiuj vizitis Sydney dum siaj vojaĝoj. Aliaj bonvenaj vizitantoj estis S-ro Guilbert (Tasmanio) kaj S-ro Dick Latimer.

Kiel nova klub-ano venis S-ro Scarini el Italujo, al kiu ankaŭ bonvenon.

Proksimume 80 personoj ĉeestis Zamenhof-Vesperon en Decembro. La programo estis gaja kaj vigla mondro de internacia kunlaboro. Ĉeĥa samideano reĝisoris, anoncanta la erojn en Esperanto kaj angla lingvo—tio multe interesis la vizitantojn. Ni ĝuis svedajn popolmelodiojn luditajn de skoto kaj svedo. Beleg-voĉa ĉeĥa tenoro kantis italajn kaj ĉeĥajn kantojn, anglo kantis aŭstraliajn popolkantojn, germano prezentis poemojn

tradukitajn en Esp. el la germana, kaj tiel plu.

Krome, kelkaj anoj mallonge parolis pri siaj Esperantaj spertoj, kaj pro siaj konvinko kaj sinceraj vortoj fortigis la malnovajn anojn kaj interesis vizitantojn.

Inter la ĉeestintoj, S-ro Joab Eljot estis precipe bonvena. Tiu ĉi estimata, malnova ano ĵus resaniĝis post sufiĉe grava akcidento.

Ankaŭ Zamenhof-vespere Ges. Rutland adiaŭis nin, ĉar frue en Januaro ili vojaĝos al la alloga Eŭropo.—E.D.

ZAMENHOFA FESTO, 1954.

Plensukcesa Festo okazis en la hejmo de la Sek-jo, S-ino V. Fraser, Clayfield, Brisbano.

Tre granda plezuro estis la reveno de du malnovaj anoj, S-roj H. N. Love, S-ro W. J. Meadley. Oni ankaŭ salutis du novajn anojn, Majoro kaj S-ino S. Beck.

Tre ŝatata programero estis serio da lumbildoj pri malnovaj kaj historikaj konstruaĵoj, k.t.p. en, kaj ĉirkaŭ Brisbano, S-ro H. Love kaj lia filo, S-ro Theo Love, ricevis fortan aplaŭdon de la ĉeestantoj pro la bonega prezentado.

Bongusta noktomanĝo preparita sur bele ornamita tablo, de S-inoj Fraser kaj Parry, kun valora helpo de S-ro Max Fraser, tre plaĉis al ĉiuj.

Honorlokon ĉe la tablo okupis bongusta kuko, surhavanta nian insignon el verda sukeraĵo.

Ciesopinie, la 54-a estis la plej bona dum jaroj.

LATEST FROM MONTEVIDEO!

The General Conference of Unesco, after the Commission had rejected the Resolution, passed it on December 10. The Resolution says:

The Conference notes Esperanto's attainments in fields of international labor similar to those of Unesco; commissions the General Director to further follow evidences of Esperanto's use in education, science and culture, and so to work with the Universal Esperanto Association in all things that interest both organisations; and notes also that several Member States have declared themselves ready to introduce or expand Esperanto in their schools; these States are invited to inform the Gen. Director of the results attained in this relation.

COMMITTEE of UNESCO in Montevideo decided by all voices bar two, to recommend to General Conference acceptance of the UNIVERSAL ESPERANTO ASSOCIATION in a consulting capacity.

Kial neniu Esperanto vortaro donas difinon de "Plenumkomitato"?

DE LA PREZIDANTO.

Vekis apartan intereson la artikolo sub la rubriko "Libera Forumo" (paĝo 78 de la Okt.-Dec-a "Rondo"), des pli, ke ĝin subskribis la 3 ĉef-oficuloj de la Sidneja grupo, kaj ankoraŭ des pli, ke ĝi enfokusigis problemon, kun kiu jam luktadis la estraro mem de A.E.A.

Post esploro kaj la kalkulo, ke dekunu ŝablonitaj numeroj kostus egale kun ok presitaj, sin prezentas la demando, ĉu oferi kvaliton por kvanto. Tia ŝanĝo, tamen, ne metos monon en la propagandan kason, krom se iu faros la laboron senpage, kiu ebleco ekzistas ankaŭ pri la presado, kvankam ne kun la sama probableco. Ĉu iu volontus, garantiante daŭran deĵoron??

Ni devas danki Sidnejon pro la unua puŝo, sed la finan decidon devos fari la tuta anaro de A.E.A. ĉe ia venonta kongreso en Canberra pri ĉi tiu aktuala kaj tre grava temo. Tamen, intertempe ĉiu dediĉu sin al la problemo.—Via Prezidanto KEN. G. LINTON.

DELEGITO?

Translating "deligito" of U.E.A., thoughtful English-speakers may feel that "delegate" hardly fills the bill, owing to several divergent definitions of the word. Strictly speaking, a "delegito" is one **commissioned** to serve in a certain capacity—a "komisiito" or commissioner — and so Wingen for "delegito" uses "Beauftragten" (commissioners) in his German foreword to "Wir lernen Esperanto." This would confirm the use of "commissioner" by those feeling it to be better than "delegate."

The hardly appropriate form "consul", seen now and then, has been queried on the ground also of possible infringement of diplomatic privilege.

Gratulojn al nia mondvojaĝinto Frank Halls, kiu edziĝis la 22-an de Dec. 1954 al f-ino Dorothy Dean.

Tra La Mondo

AUSTRALIA: A tombstone, unique in this country, is to be seen near Adelaide. It marks the grave of William L. Waterman (obit. 1938). It bears the epitaph: Lia boneco estas lia vera monumento.

AUSTRIA: Mayor of Vienna, Franz Jonas, said before the Socialist Esperanto League of Austria: "I thank my stars that I learned Esperanto. I have learned six languages, but have mastered only Esperanto—the others I can only stutter."

BRITAIN: The Universal Esperanto Assn. has (August, 1954) 13,536 members against 11,192 the year before.

"Sunderland Echo" reports that at a Durban school not netball, geography, etc., but Esperanto is the favored subject with pupils. On leaving, philological students especially have found the language helpful.

BELGIUM: In Antwerp, another "Esperanto Street."

CZECHOSLOVAKIA: Heyerdahl's "Kon-Tiki" has been translated into Czech from the Esperanto version and will soon appear. The original was in Swedish. Here is another example of Esperanto as a "bridge" language.

Olmouč Youth Club received 97 letters from 21 countries; an exhibition—attended by some 3000—got 80 from 19.

At Otrokovice an Esperanto congress. Theme of the first day: Esperanto Literature; the second—Through Esperanto to World Peace.

FRANCE: Maurits Dekker's "The World Has No Waiting-room" (written in Dutch: De wereld heeft geen wachtkamer) was translated into Esperanto, thence into French (another "bridge" job). This play has been performed 1500 times in Europe, sometimes in Esperanto. The west French press applauded the version. Dekker himself acclaimed the rendering as "conserving the exact content of my drama."

"Editions Nova," selling through thousands of book-shops, has undertaken a series of Esperanto instruction books. Well known gun and bike firm publishes a yearly catalog in five languages, including Esperanto.

It weighs over 2 lbs.

The Campaign for the Popularisation of Esperanto has over 500 members. 12,000 letters received asking for information. Trips abroad are awarded to the best hundred Esperantists. M. Delaire, the chief, runs a weekly radio session in Esperanto from Paris.

Andre Marie, Minister and mayor of Le Havre, is honorary president of the Normandy Esp. League.

GERMANY: A film, Von Himmel gefallen (Fallen from Heaven), starring Joseph Cotten and Eva Bartok, is being made by Columbia Pictures. In it Esperanto is used in dialogues to avoid identifying any particular country.

Dresden (Russian Zone) has now a Zamenhof Street.

JUGOSLAVIA: Esperanto has been introduced into the Economic Faculty at Zagreb University. At Pula economic school it is an optional subject. Three lessons a week; over 30 pupils.

SWITZERLAND: Seventh congress of Esperantist Railwaymen at Zurich. With 400-600 visitors to the gathering, this body is the largest of the "sectional" (special interests) Esperanto organisations. Chemistry Congress in Zurich invites "lectures and short communications in any language." Here is a chance for those Esperantists on their way to the World Esp. Congress at Bologna.

10-a Tut-Aŭstralia Esperanto-Kongreso

okazos en Canberra (2-8 Jan., 1956). Por ke la Kongres-Komitato povu ĉiun bone prepari, sendu jam nun vian kongreskotizon al s-ano Harry Torr, 71 Miller St., O'Connor, Canberra. Ordinara Kotizo £1, ne-partoprenantoj 5/-, Patrono: Libervola Kotizo (pli ol £1). Por rezervi ĉambrojn aldonu £1 depon-monon. Detaloj sekvos.

Kongresa Konkursko.

Canberra E-Klubo donacas premion de £5/5/- al interesa konkursko. Verku leteron kiun vi dezirus ricevi pri la Canberra E-Kongreso. Teksto limigita al 100 vortoj. Aldonu 1/- kiel konkurs-kotizon (1 resp. kup. el eksterlando). Plej bonaj kontribuajoj aperos en La Rondo. Kontribuajojn sendu al s-ro H. Torr, 71 Miller St., Canberra.

Recenzoj

"Pri la Spirita Scienco de Martinus." Broŝuro sendata senpage al ĉiu petanto, kun kromaj ekz-oj se dezirataj. Skribu senhezite al Instituto Martinus, Mariendalsveg, 94-96, Copenhagen, Denmark.

La Kapao Kaj Aliaj Rakontoj: de Akutagawa-Ryunosuke, trad. Nozima-Yasutaro. Eldonis Japana Esperanto-Instituto, Hongo-Motomati 1, Tokio. 94 p., $\frac{1}{2}$ Usona dol.

En la ĉefa rakonto (eld. 1927) tiu elstara verkisto kritikis la vivon de sia tiama Japanujo. Li uzas la teknikon de Swift (La Vojaĝoj de Guliver), Bulwer-Lytton (La Venonta Raŝo), Samuel Butler (Erewhon), H. G. Wells kaj aliaj, bildante socion de kuriozaj monstroj, kapaoj—fantaziaj bestoj en la Japana folkloro. Priskribante kutimojn kaj morojn tre strangajn de tiu socio, li vualvorte kritikis la propran.

Bedaŭrinde mankas al la plimulto de okcidentanoj facila kompreno pri la japana socio, tiama aŭ nuna, tial la aludoj kaj lerte maskitaj pikdiroj restas senefikaj, ĉar sensencaj por ili.

Ni devas supozi, ke sufiĉe da Japanoj povas interpreti kaj ĝui ilin. Ĉu ili tamen komprenus la subtile karikaturnajn vortbildojn de Swift aŭ Butler? Eĉ Angloj, por kompreni la socikritikan valoron de tiuj verkoj, devas legi printotitan eldonon, aŭ librojn pri la verkoj mem. Ĉu homo povas kompreni fantazian satiron pri efektiva socio, se li ne scias pri tiu socio mem?

La "aliaj rakontoj" en la libro pli interesis ol la ĉefa. La lingvo estas klara, tamen "transpara" (travidebla) indikas nesufiĉan zorgon.

LA INTERNACIA LINGVO, Faktoj pri Esperanto: verkita de D-ro Ivo Lapenna kaj eld. de la Centro de Esploro kaj Dokumentado de U.E.A. 192 p. kun indekso. 14/- Aŭstralia mono.

Pri tiu mirinda informilo ni poste recenzos. Dume mendu ĝin ĉe niaj agentoj.

"LEGU KAJ RIDU!" gajspirita leglibro, 88p. broŝ., 2.80 g.m.; bind. 3.80 g.m. Petu ĉe niaj agentoj pri la aŭstralia prezo. Eld. S. Ziegler,

Engelbertstr. 7, Muenchen - Pasing, Germany. Kompilis ĝin K.O. Schmidt.

Imitinda ekzemplo de kolektiva laboro kun valora celo. Grupanoj de Germana klubo E-a reciproke sin helpis perfektigi per amuza, interesa kaj instiga maniero—regule rakonti ŝerc-ojn, groteskajojn kaj similajn. Gvidanto kolektis la plej bonajn, por formi utilan leglibron por komenc-kaj progresintoj. Aprobis la plaĉan libreton la Lingva Sekcio de G.E.A. Kial niaj kluboj ne simile agas? La Rondo presigus la "kremon" de tiaj kontribuajoj.

"ADAMO KAJ EVO", Francisko Azorin, Meksiko. En ĝiaj 15 paĝetoj oni trovas—"triaktan dramon", kies senpotencon vi rajtas antaŭsupozi.

Ignoro de la Zamenhofaj formoj de la propraj nomoj bibliaj estas mallojaleco al la lingva unueco; nescio pri ili estas nepra kondamno.

INSTRUISTOJ!

S-ino G. Pollard en letero 28.12.54, nome de la Aust. E. Soc. Instruista, tre forte deziras la **adresojn** de homoj, kies nomojn ŝi havas. Ricevinte la adresojn, ŝi povos ordigi la aferojn de la Societo kaj espereble doni al ĝi la solidecon de efektive funkcia organizaĵo. Pri la kotizo ŝi konsideras, ke "la lastjara kovros ankaŭ ĉi tiun jaron."

Bonvolu, instruistoj, respondu al, ŝi kaj ricevu informon ĉe: Mrs. G. Pollard, 128 Raglan Rd., North Perth.

PYKE EXAMINATIONS.

This annual fixture should be held on November 16 or two days either side of that date. A prize of £5/5/- is given for the best student not having studied more than one year from last November. A circular will be sent to group secs. later. Please make this known and contact me for particulars.—Editor.

LIBERA FORUMO.

Mi tute ne konsentas pri la letero de gesamid. Matasin, Dash kaj Klusendorf en L.R. N-ro 64, Okt.-Dec. (erare numerita 63).

La rekomendo estas jene: ĉar la profesie presita L.R. ne aperas sufiĉe ofte, ĝi do fariĝu nura ŝablonajo kaj klub-informilo.

Por plioftigi la aperon de la profesie redaktata kaj profesie presata organo de la A.E.A., la solvo kompreneble estas: pli alta abonprezo, pli multaj abonantoj.

Sajnas al mi tre neracie, ke klubo, kiu ne sukcesas eldoni ian propran ŝablonitan klub-informilon, kritikulo la A.E.A.-n, kiu, malgraŭ ĉiaspecaj malhelpoj, tamen sukcesas de tempo al tempo doni al la mondo altnivelan legendajon.

Organo de la A.E.A. ja devus esti tia, kia ĝi ja estas sub la nuna lerta gvidado, multe pli ol nura klubklaĉpaperpeco.

—Joab Eljot, ano de Sydney E.S.

VIZITO AL JAPANUJO.

Dum Okt-o, Nov-o, Dec-o, f-ino Alice Longson, Sekretario de la Okcident-Aŭstralia Esperanto-Ligo, faris ŝipekskurson sur la "Changte", al la malproksima oriento kaj ne preterlasis la okazon kontakti E-istojn, Jen elĉerpajoj el leteroj senditaj al la A.E.A.-sekretario pri ŝia interese ga vojaĝo:

"Dum mi restis en Japanujo mi vizitis Kure, Yokohama, Tokyo, Kyoto kaj Kobe. Sajnas ke ne estas E-istoj en Kure, ĉar mi ne renkontis ilin. Kiam la "Changte" atingis la kajon je Yokohama estis krepusko, sed jen sur la kajo estis grupo da E-istoj kiuj flirtigis la verdan standardon. Post ne longe ili salutis min sur la ŝipo kaj mi aŭdis multe pri la japana movado. Mi opinias ke ĝi ne estas tre forta, sed same kiel en Aŭstralio la anoj estas tre entuziasmaj.

La grupo en Tokyo gastigis min kaj mian fratino kaj prezentis al mi E-libron presitan en Japanujo. Mi sentis min inter veraj amikoj. S-ano Blatt (usonano loĝanta en Tokyo) kondukis min dum tuta tago tra la grandega Tokyo por montri al mi la vidindaĵojn.

Per vagonaro mi vojaĝis de Tokyo al la malnova urbo Kyoto kaj trovis ke japanaj vagonaroj estas trege komfortaj. Post enlitiĝo en la Kyoto-a Hotelo eksonis la telefopo: "Bonan tagon, f-ino Longson" mi aŭdis la voĉon de Prof. Fuji de la Universitato de Kyoto, kiu bonvenigis min al sia urbo. La proksiman tagon li montris al mi la interesajn vidindaĵojn de Kyoto, la malnova ĉefurbo

japana, kaj ankaŭ tre interesan Esperanto-Ekspozicion ĉe la universitato. Per vagonaro mi atingis Kobe, kie mi denove enŝipiĝis sur "Changte". Tie, s-ano Matumoto Kiyosi kaj Wiŝijima Yukitoŝi vizitis min la unuan vesperon kaj mi tre ĝuis la interparoladon." (Dankon al f-ino A. Longson pro ŝia interesa raporto!)

SENTO INTERNACIA.

S-ro Frank Halls Oktobro 1952 alvenis al Landeck (Aŭstrujo) kaj vizitis la tiean junulgastejon. En la libro vizitula li legis:

Who never journeys from his native strand,

Nor quests the wonder of a foreign land;

Who sees no wider than his country's good,

Disdaining those of alien race and blood.

Who never quests a friend beyond the seas—

What maketh he for brotherhood and peace?

La sekvanta provo modesta povas esti plibonigita. Kopiu la anglajn versojn kaj dum liberaj minutoj en veturado penu fari vian propran tradukon en Esperanton.

Jen homo fiksradika en la patrujo—

Ignoras li mirindojn de la mondo-cetero;

Li pensas nur pri bono de la propra lando,

Malsatas fremdajn homojn jam de vert' ĝis plando.

Se vi amikon alilandan ne deziras, Malmulte pacon interhoman vi sopiras.

SUB LA SIKAMORO.

Senĝeno! Beno! Jam reveno

De l' printempa oro!

Sungaja brilo! Birda trilo!

Abelzum' de l' floro!

Vivoĝoja horo!—

Kaj ci, en paca foro.

Pace restas ci, kaj nestas

Sub la sikamoro!

Pitoreskas ĝi, kaj kreskas

Laŭ vivanta gloro!—

Nur mia, la doloro,

La larm-gutanta koro.

—Joab Eljot.

NOVA ELDONO de "Fundamenta Krestomatio" aperis en Januaro, sur bona papero! W. Bailey, Esp-isto enciklopedieca, detale prinitis le verkon sed mortis 1946 antaŭ fincelo. Lian taskon kompletigis Pastro Downes. "F.K." de longe elĉerpigis. Mendu ĉe niaj agentoj. Se bona vendo, aliaj Zam-aj verkoj simile eldonigos.

Laŭ enketo 62 elcentoj de la Usonaj edzoj helpas al siaj edzinoj ĉe la domlaboro. Usonano ne estas sinonima kun milionulo. Pli ol 38 elcentoj posedas aŭtomobilojn. Eble ĝuste pro tio ili devas domfaraje helpi la edzinojn?

"'Kvarope' estas eldonita en nombro 3-4 oble pli granda ol la eldonkvanto de tia volumo en la Angla lingvo. . . . Kvankam nur miloj parolas E-on, relative granda procento estas kulturaj homoj, kiuj estas pretaj eĉ legi bonajn poemojn, kaj volonte aĉetas (almenaŭ ni esperas tion!) poemaron se ĝi tion meritas. Mi opinias do ke, verkante en E-o, mi atingas pli vastan publikon ol mi atingus per la Angla lingvo".—W. Auld, en Nederlanda E-isto.

(En Danlando kaj Nederlando) mi veturis en pli ol 40 trajnoj kaj nur trifoje mi renkontis personon kiu scipovas la anglan lingvon—kaj tio en landoj kie, laŭ onidiro en Anglujo, ĉiu loĝanto povas paroli ĝin!

—Cecil C. Goldsmith.

SUBSCRIPTIONS

Messrs. J. Dudley, H. Cohen, M. Cohen, V. Smith, E. Thompson, Kew, C. Thompson, K. Linton, Burstin, Koppel, Crowe, Biondi, J. Cranswick, J. Sullivan, G. Scarzini, E. McKenzie, M. Leereveld, D. Guilbert, 12/6; Ottens, 6/3; Mesd. Perenzi, A. Hintze, E. M. Hill, O. Glenie, Koppel, F. Rawson, 12/6. Misses G. Calwell, E. Godfrey, V. Cox, H. Crampton, Wilans, 12/6. F. V. Taylor, E. Hearn, F. R. Banham, Dr. F. Williams, 20/-; L. Pfahl, 13/-.

La Rondo

The Australian Esperanto Monthly

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 12½\$ (aŭ 20 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 4\$.



Redaktoro: F. R. BANHAM, 2 Banchory St., Essendon, W.5, Victoria.
Adreso de A.E.A.—Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.

Kasisto: E. McKenzie, 117 Mitchell St., Northcote, N.16, Vic.

Vol. 12, N-ro 66.

MELBURNO.

Marto-Aprilo, 1955.

IVO LAPENNA'S TRIUMPH

The Resolution favoring Esperanto was carried by the General Conference of UNESCO, after having been rejected by the Programme Commission, in which Professor Blinkenberg of Denmark, by senseless mockery, provoked a frivolous atmosphere before an assembly that lacked many of the authorised delegates, most of whom intended to support the Resolution. Voting later, before the General Conference, however, was 30 for; 5 against, with abstentions. The text of the Resolution appears in February issue of "Esperanto", together with a full account of the affair. The Resolution recognises the results attained by Esperanto, affirms those results to be in keeping with the aims and ideals of UNESCO, authorises the Director-General to follow current development of Esperanto in different fields, notes that certain States are ready to introduce or expand Esperanto in the schools, and asks these member States to keep the Director-General informed of results here.

The circumstances in which the Resolution was defeated in the Programme Commission caused a wave of popular sympathy for Esperanto throughout Uruguay and especially in Montevideo. The daily papers gave prominence to the taut drama, and warnings of a cultural scandal of world significance seeped into the Conference room. Finally, Dr. Lapenna, though not granted the right to address the General Assembly, insisted on a second vote, and saw the Resolution decisively passed by a full

General Conference.

Than Dr. Lapenna, surely no one since Dr. E. Privat and the League of Nations has played a more heroic role in the battle for international recognition of Esperanto. Four men in one—polyglot, jurist, diplomat and orator—Lapenna, by sheer force of character, undismayed by early failure, tore open the gates to victory.

No better way of repaying him can be found than in the firm determination of every one of us to use to the full the increased opportunities now open to us. The gains are great and significant, but unless wisely and energetically availed of his splendid work will be in vain.

On p. 90 you will find the famous Three-Minute Speech, in which Lapenna crushingly denounced the tactics of the academic dolt whose puerilities poisoned the air of the first assembly.

Extract from letter (8.12.54) to UNESCO:—

... In the name of those having signed the Petition, I cannot refrain from protesting against the form of intervention taken by the honorable delegate for Denmark. The attitude to Esperanto is not, of course, the question here. For one has the right to be for this reason or that, against Esperanto, and even against the idea itself of a common international language. Such an opinion must be respected even when it is based on ignorance or erroneous interpretation of the facts. It is quite another thing

publicly to ridicule, in the very centre of UNESCO, a language which has been accepted by and is supported by a million people, and which, furthermore, enjoys the support of 492 powerful organisations. To speak mockingly in the presence of a man who personally knows very many happy families in which Esperanto is used as the language of the home—certainly not through “fanaticism”, but simple and solely because it is the only common language of the married couple—that such a language cannot serve to express love, is shocking. That mocking tone wounds not only the noblest feelings of family love—it offends even the sanctity of the marriage ceremony (ecclesiastical or civil) performed, in such instances, in Esperanto.

To speak ironically of the value of Esperanto literature — belletristic, scientific, translated or original — is offensive for all who write in that language, included among whom being Prof. W. E. Collinson, of the University of Liverpool, and Prof. Bjorn Collinder, of the University of Uppsala.

Finally, to assert that Esperanto in any case is not a language, and that it serves no purpose in culture, is offensive to those who signed the Petition, on which are found the names also of M. Vincent Auriol, ex-President of the French Republic, Dr. Willem Drees, Minister-President of the Netherlands (a very good Esperantist, who made an admirable speech last August in Esperanto at the Haarlem Esperanto World Congress—in that language which, according to Prof. Blinkenberg, is not a language; Dr. Engineer Leopold Figi and many other eminent personages in political, scientific, educational and cultural life.

This assertion (of Prof. Blinkenberg) is, moreover, contrary to the concept of the Danish Government, for this Government, among other things, distributed a cultural film on Denmark with the text in Esperanto. The speech of the Danish delegate is also contrary to the statute of UNESCO, which proclaims the equality of language, and to the Resolution opposing racial . . . and lingual discrimination, accepted some days ago in that same Programme Commission. . . . (Dr.) IVO LAPENNA.

THE FAMOUS THREE-MINUTE SPEECH OF LAPENNA

Before the Programme Commission' of UNESCO, 4 Dec.

I do not know whether in three minutes one can say anything other than that one can say nothing, but I will try.

The intervention of the honorable Delegate for Denmark is of such a character that it does not merit serious consideration. By his baseless assertions he has shown that he has no idea about that of which he so superciliously spoke. To give authority to his words he emphasised that he is a linguist, but I can quote many outstanding linguists, for example, Meillet, Mueller, Marr, Shishmanov—who had quite a different opinion of Esperanto. I can inform him, for it seems that it is absolutely unknown to him, that other linguists, such as the Englishman Prof. Collinson, the Swede Prof. Bjorn Collinder, the Frenchman Waringhien, to name only a few, speak the language perfectly and even publish books in Esperanto. In fact, they are the only ones who, knowing the language thoroughly, can form an objective judgment of Esperanto.

I feel compelled to mention yet again, that the Petition in favor of Esperanto was signed by 492 organisations with 15,454,780 members, and by almost a million people individually, in 76 lands. Among those signing it—and I underline this fact—were 1607 linguists. It is the greatest Petition ever presented to any international organisation in the entire cultural history of mankind.

Considering the importance of the Petition, as also the fact that language barriers present one of the greatest obstacles to better co-operation among the peoples, the Universal Esperanto Assn. strove to present to UNESCO the most complete documentation on the teaching of the language, and the origin and evolution of Esperanto, its rich literature, gazettes and reviews, and its application to science and education. The Centre of Research and Documentation published and distributed to all delegations, besides this, a special document with the title “The International Language and the Contribution of the Esperanto

Movement to UNESCO." The great Exhibition, only a hundred paces away from the Palacio Legislativo, is a further, impressive document, concerning part of that which until now has been created in Esperanto and by means of it.

Among other things, the exhibition contains about three thousand books, about 600 gazettes and reviews and a large number of scientific and educational terminologies. I add that one observer of UNESCO took part in the work of the Esperanto Congress at Zagreb in 1953 and had the opportunity to see and hear how perfectly the language functions in debates and discussions, in the summer university, at art festivals. He was convinced that almost 2000 persons of the most diverse countries amazingly understood each other without translations, without interpreters, without those terrible listening-aids which—as you know and feel very well right at this moment—pain your heads and worry your ears!

I hope that, after the delegates have seen and read this abundant documentation, the Commission will be able to make an objective decision concerning the Petition. During this Conference much has been said about better understanding among the peoples. To conclude, I desire in this relation to quote Romain Rolland, who said: "In order that the peoples may understand each other, they must first understand. May Esperanto give hearing to those deaf-mutes, of whom each one, for centuries, has been immured in his own language."

The full quotation from R.R.:—In order that the peoples may understand each other it is first necessary that they may be able to listen, and, listening, understand (each other).

—Note F.R.B.

KIEL ONI VOĈDONIS.

Inter la 30 voĉoj por la Rezolucio en Montevideo estis la aŭstra, brazila, brita, ĉina, franca, greka, hondurasa, itala, izraela, jugoslava, luksemburga, meksika, nederlanda, norvega, novzeland, sveda, svisa kaj urugvaja.

Inter la 5 voĉoj kontraŭ la Rezolucio estis la dana, egipta, kuba (verŝajne ankaŭ usona). Kontrolo estis malfacila, ĉar la voĉdono okazis nur

per manlevo, kaj oni ne speciale notis la ŝtatojn voĉdonintajn. Certe sin detenis Sovet-Unio, Bjelorusio, Ukrainio, Pollando, Ĉeĥoslovakujo, Hungarujo.

Australia Kroniko

● **MELBOURNE:** Okazis je 2/3 la Generala Kunveno. Elektigis la jenaj: Prez. s-ro E. McKenzie, Vicprez.: s-ro W. J. Drummond; Sekr.-Kasisto: s-ro H. M. Cohen; Biblioteko: s-ro E. M. Hill; Komitato: s-ro S. Milligan, s-ro H. Koppel, s-ro Burŝtin, f-no G. Calwell.

Trovi parolantojn por la klub-vesperoj estas ĉiama malfacilaĵo, sed spite de tio sufiĉe da interesaj vesperoj aranĝigis. Gisdatajn novaĵojn "Tra la Mondo Esperantista" donis s-ro H. Koppel (9/3) Speciale menciinda estas la programo de 16/3, kiam en ĉesto de proks. 40 personoj oficisto de la Stata Elektra Komisiono de Viktorio (s-ro Halkyard) prelegis (anglalingve) kun interesaj lumbildoj pri la laboroj de tiu grava organizo. Bonvena aldono al la "Speciala Fonduso" estis la rezulto.

Libro-recenzo de s-ro Hill (23/3) multe plibonigis malgrandan scion pri la mezmara insulo "Cyprus". Alparolo de s-ro Burŝtin (6/4) kiu temis pri "Edukado de Infanoj", malkovris kelkajn interesajn faktojn. Bone preparita kaj ege interesa estis prezentado de s-ro J. Oki (13/4) Klarigo de dumilitaj japanlingvaj elsendoj de "Radio Australia" estis la celo por kiu li pretigis registritajn program-ekzemplojn. La anaro sekvus kun granda intereso tiun ĉi programon. Nova parolanto, kvankam ne nova membro de nia klubo, estis f-ino E. Styles (20/4), kiu per tre bonstila maniero rakontis strangan, sed veran, historieton pri "Brulanta Lago" en la orienta parto de Viktorio. Samvespere s-ro H. Koppel faris entuziasman priskribon de nia bela ĉefurbo Canberra, kie okazos la venonta Kongreso. Veki deziron partopreni estis la celo, kiu ŝajne bone sukcesis.

Veru vidindaj estis lumbildoj montritaj de f-ino Stella Rosengrave ĉe la Februara RENDEVUO. La belaj, de ŝi mem faritaj, naturkoloraj fotografajoj de flornamitaj montoj, ar-

barvojetoj, respregulaĵoj en lago, sunsubiraj nuboj ktp. pruvas ke en Aŭstralio troviĝas belecoj tiel variaj kaj mirindaj kiel ie en la mondo.

Kvazau daŭrigante la temon, ĉe la Marta kunveno ankaŭ s-ro Hanks montris per lumbildoj multajn aŭstraliajn belecojn. La temo estis "Belecoj ofte vidataj sed malofte rekonataj", kaj li pruvigis ke ne necesas vojaĝi por trovi belecon se nur oni bone observas. Arboj ĉiuspecaj konsistigis la bildojn—jen grandaj eŭkaliptoj pitoreske solecaj, ĉiu kontraŭ fono el ĉielo kaj nuboj en si mem bela pentrindaĵo, jen dense kreskantaj arbaroj en kiuj la verdaj nuancoj estis vere sennombraj, jen vico da multkoloraj florarboj, jen nur unu ruĝfloro kovrita. Bonan lecionon pri observado donis al ni s-ro Hanks.

● **CANBERRA:** La jarkunveno elektis la jenan estraron: Prez. s-ro H. Torr; Vicprez. s-ro J. Sullivan; Sekr. s-ro N. Gamble; Protokol-Sekr. s-ro Halls; Vic-Sekr. s-ro H. Downey; Kasistino s-ro J. Torr; Bibliotekistoj: J. Wallis kaj H. Downey; Libro-Servo Peranto: S. Fulop. Ni elektis Protokol-Sekretariinon kaj Vic-Sekretariinon ĉar s-ro N. Gamble forestos dum 6 monatoj, vizitante la Universalan Kongreson en Bulonjo. La ĉeestantoj dankis al s-ro Johns, kiu kvankam ne-Esperantisto tiel bone helpis nin kiel kaskontrolisto; li afable konsentis denove fari tiun servon. Detala raporto pri la jarkunveno aperis en "Canberra Times."

Nova antaŭenpuŝo estas ke "nia bona amiko", la "Good Neighbour Council", asignis al ni specialan ĉambron, do ni nun vere havas propran hejmon.

La plej fundamentaj aranĝoj por la 10-a Kongreso estas plenumitaj. Aranĝoj pri loĝejoj estas faritaj, kondiĉe ke ni pagu deponmonon ne pli malfrue ol Septembro, tial, la komitato decidis, ke malfruaj aliĝintoj devos pagi pluan 5/- post tiu dato, same kiel ĉe UEA-kongreso. Aranĝoj pri kunvenejoj kaj la granda "Internacia Koncerto" en la "Albert Hall" (kune kun "Good Neighbour Council") estis faritaj.

Ni dissendis cirkuleron al eks-anoj, konataj amikoj de la E-movado ktp, invitante ilin au aliĝi al la kongreso, au fariĝi patrono, au simple doni donacon.—Harry Torr.

Lastmomente atingis nin interesa jarraporto el Brisbano, el kiu ni publikigos parton venontnumere. Niaj kluboj en Perth, Adelaide kaj Sydney estas petataj sendi pli regule raportojn pri siaj kunvenoj al Box 2122T, Elizabeth St., Melbourne. Dankon por regula kunlaboro.

REDAKTOROJ!

Sendu gazetojn, librojn kaj ceterajn **REKTE** al F. R. Banham, 2 Banchory Street, Essendon, W.5, Victoria, Aŭstralio, por ke li povu senprokraste pritrakti aferojn.

Bonvolu ne plu ignoru tiun alvokon!

10-A TUT-AUSTRALIA ESPERANTO KONGRESO.

Leteradreso: Canberra Esperanto-Club, 71 Miller St., Canberra.

La Kongreso okazos en la unua semajno de Jan. 1956. Aligŭ jam nun. Per tiu-ĉi numero de "La Rondo", ĉiu leganto ricevas aliĝilon. Plenu ĝin kaj sendu ĝin al la kongres-sekretario. Se vi mem ne povos ĉeesti, aliĝu almenaŭ kiel nepartoprenanto (kotizo 5/-) Kotizo por partoprenanto estas £1 ĝis 30.9.1955; post tiu dato £1/5/-. Afable aliĝis kiel Patronoj:

S-no E. M. Hill (Melbourne)

(£1/5/-).

S-ro Herbert Koppel (Melbourne)

(£1/5/-).

1-a Listo de Aliĝintoj:

1. S-ro Koppel (Melbourne)
2. S-no F. Koppel (Melbourne)
3. S-ro N. Gamble (Canberra)
4. S-ro J. Matasin (Sydney)
5. S-no E. Matasin (Sydney)
6. S-no E. Kluessendorf (Sydney)
7. S-ro H. Long (Sydney)
8. S-no H. Long (Sydney)
9. F-no E. Dash (Sydney)
10. S-ro F. Dash (Sydney)
11. S-ro H. Torr (Canberra)
12. S-no J. Torr (Canberra)
13. S-ro W. Chandler (Sydney)
14. F-ino Smith (Sydney)
15. S-ro R. Latimer (Nowra)
16. S-no A. Hintze (Melbourne)
17. S-no E. M. Hill (Melbourne)

Rezervu ĝustatempe hotel-ĉambron, aldonante £1 kiel deponmonon.

Paĝo 88, kol. 1, 9a linio de la subo: legu "ĉe l'floro".

Recenzoj

LA INTERNACIA LINGVO — FAKTOJ PRI ESPERANTO. De D-ro I. Lapenna; eld. Centro de Esploro kaj Dokumentado de U.E.A. 192 p. 14/- Australia.

Kiom longe kaj ofte la celkonscia E-isto ardis posedi daŭre utilan konsultlibron pri la I.L. kaj la pozicio de E-o koncerne ĝin! La verko de W. J. Clark, "International Language" (1912), ankoraŭ tre leginda sed kelkparte malaktualiĝinta, ne plu estas aĉetebla. Tiuj de E. Privat, "Historio de Esperanto", kaj E. D. Durrant, "The Language Problem", ankoraŭ vendataj, surhavas daton 1927 kaj 1943 respektive. Similkiale, multo mankas al la dise semitaj informoj de la Enciklopedio de Esperanto (1953-4). Oni ankoraŭ longe ekprenos ilin por fiksj faktoj, sed ne por scii, kiel staras E-o nuntempe.

Ci-libro de Lapenna estas tial necesa por ĉiu defendanto de E-o, ĉar en ĝi troviĝas, bone aranĝitaj, la ĝisdataj sciendaĵoj pri la ekesto de E-o kaj ĝia instruado, literaturo, aplikado, praktika, organizo kaj aktiveco en interfratiga laboro tutmonda.

La verko estas videbla atesto al la penado pacienca, serĉado streĉa, cele al tiu monumenta faktokolekto, kiu fine kaj favore Uneskon impresis.

La valoro de la verko por si mem faras ĝin aĉetinda. Cetere, krome kaj aldone—nia admiro kaj danko al nia plenmerita advokato devus nin ekpeli al tuja mendo; ankaŭ per tio ni donus al li kaj liaj kolegoj bezonatan helpon ĉe C.E.D.

Interesa takso: "Streĉita Kordo" estas la plej grava poemaro en Esperanto; ĝia aŭtoro (Kalocsay)—la unua genistatura viro post Zamenhof."

Sajne linio mankas je p. 77: "En la jaro 1953 ekzistis 20,000 libroj en Esperanto." Sensualo, p. 60, ne en la P.V. en tiu formo. Por anglo, kaj supozinde ankaŭ por francoj, la vorto signifas nur voluptama (-ema), minimume sentama, ĝuama. Ke homo voluptama povas esti "kulturita animo, akute observanta", jen demando por debata societo. Kulturo al kiu mankas ia spiritalismo nepre devas esti malekvilibra.

54: Viktorinaj. Kiel nomu la reĝinon Victoria? 59: Kalomano; 102: Kreuz. Kio signifas (p-to j de la ...)?—F.R.B.

MATEMATIKA TERMINARO. Eld. U.E.A. Kompilis C.M. Bean. 40 p. 2/- ĉe agentoj.

Ni jam posedas 106 teknikajn vortarojn aŭ terminarojn por 43 branĉoj de la scienco. Miloj da personoj donis milionojn da laborhoroj al tiu giganta tasko. Kia oferemo kaj pacienco montriĝas per tia sumo da utila faritajo! Ĉiu tradukanto, precipe tiu havanta aferon kun la ciferscienco devas skiri la verketon, frukton de intensa pensostreĉego. Ĝi estas krome monumento de sagaca arango.

WOERTERBUCH DEUTSCH-ESPERANTO, Hans Wingen. 176 p. 25,000 vortoj. gmk. 7.50. Petu ĉe agentoj.

Komplementa vortaro al tiu de Butin kaj Sommer. Butin kaj Wingen estas vaste konataj pro sia mirinda majstreco de la moderna idiomo Germana kaj ties transmeto en E-on. La "Aktuala Terminiĉaro" de Wingen, presita en lialandaj E-revuoj, formas bazon al laboro nepre imitinda en aliaj lingvoj, kaj sendube la konoj tie uzitaj servis al li bone en la kompilado de tiu ĉi bonega vortokolekto. La Leksikografia Aldono forte aldonas al la valoro de la tuta verko, ĉar ĝi donas facilan superrigardon super la radikmaterio, kiu transiras la limojn de la Plena Vortaro. Sekcio 2 pritraktas la proprajn nomojn, kun kuraĝo kaj iniciato tro ofte mankaĵ ĉe aliaj vortaristoj. Ci-verko prenas lokon inter la simile detalecaj de Grosjean-Maupin kaj la bedaŭrinde nur-parta Enciklopedia Vortaro de Wuester. La kompakteco de tiu altkvalite bindita vortaro estas iluzia. Ĝi enhavas en si treegan mason da densigita erudicio, kaj estas do teknika kaj lertkompila miraklo.

BIBLIOGRAFIO DE INTERNACIA LINGVO EN JUGOSLAVIO. M. Gvivoje. Amruševa 5/1, Zagreb. 40 p. Sendos laŭ interkonsento. Dulingva. Grava verko, precipe por bibliografoj. Ĝi savas el forgeso tion, kion faradis por E-o

niaj bravaj kolegoj de 1908 ĝis nun.

Troviĝas kelkaj tre konataj verkoj inter la 229 unuoj listitaj. Oni legas la nomojn de la aŭtoroj kiel litanion, memorante, ke multaj el ili pagis per sia morto nian liberecon kontraŭ la teroro.

Krom sia esenca valoro al la bibliografia scienca, la verko faros eternan bonon, se ĝi instigos al aliaj naciaj centroj kompili similajn pri la propra literaturoj.

LIBERA FORUMO.

La Kongres-komitato por la Deka Tut-Aŭstralia Esperanto Kongreso, Canberra, 1956, pripensis la sorton de La Rondo. Eble ĝi povus fariĝi ero en la kongresa tagordo.

Ni ĝojis legi la leteron en La Rondo (paĝo 78) de la Sidneja grupo, kaj posta vizito de unu el niaj anoj al tiu grupo plifortigis nian intereson.

Ni konsentas kun la Sidneja opinio: La R. estas impona sed senefika. Aŭstraliaj E-istoj bezonas gazeton pli viglan, pli personan—kaj pli oftan, eĉ se ĝi estus iom malpli impona.

Kial ne vigla gazeto, kiel la Germana "Bulteno Gepatra", kelkaj specimenoj de kiu estis senditaj al nia klubo okaze de nia ekspozicio antaŭ ne longe? Kio mankas al publikajoj kiel la monataj leteroj de la Grupo Konkordo, en Clermont - Ferrand (Francujo), aŭ "Informilo", de Internacia E-Muzeo en Vieno, aŭ la Novkristanaj Traktatoj de Prago. Ili estas multobligataj, sed tre efikaj, speciale transmare.

Plua bona ekzemplo de nacia gazeto estas "The North American E-Review", presita per malsimila multobligita-sistemo, iom pli multekosta, sed ankoraŭ pli malmultekosta ol ordinara presmetodo.

Eble la plej valora funkcio de La R.—perilo por interŝango, aŭ por kluboj, aŭ por individuoj—ne estas tuzita. Eble la redaktoro povus diri al ni, kiom kostus unu plua specimeno por ĉiu Aŭstralia E-isto. Ni supozas, ke la kosto duobligi la disvendadon estus nur nominala. Tiam, oni povus oferti al anoj kaj/aŭ la kluboj la elekton, aĉeti unu aŭ pli da "transmaraj reklamadaĵoj" specimenoj.

Ni esperas, ke la afero estos solvita dum la nuna jaro, sed se ne, ni sugestas, ke ĉiu klubo pridiskutu ĝin

kaj povigi siajn reprezentantojn al la Kongreso konduki ĝin al sukcesplena fino tiam.

Harry Torr, Prez.; Noel Gamble, Sek-io; Joyce Torr, Kasisto.

La redaktoro respondas al la supra demando: unu ŝilingo.

Post legado de la leteroj de la Sydney E-Societo, de la Canberra E-klubo, de nia prezidanto kaj de la trece trafa letero da Joab Eljot, mi devas diri ke la solvo proponita de la Canberraj E-istoj estas simpla kaj trece praktika. Certe, ĉiu homo kiu nomas sin E-isto devas havi almenaŭ unu eksterlandan korespondanton. Por li aŭ ŝi, ĉiu membro abonu La Rondon. Per tiu-ĉi metodo ni ne nur povus regule ĉiumonate eldoni nian gazeton, sed ĉiu aŭstralia E-isto ricevus interŝange eksterlandajn E-gazetojn. Jen, do, bona propono pripreninda por nia venonta kongreso.

(Herbert Koppel, A.E.A. sekr.)

En la lasta n-ro de "L.R." la redaktoro asertas ke la originalo de "Kon-Tiki" estis skribita de Heyerdahl en la sveda lingvo (p. 85, kol. 2) Tio ne estas korekta, ĉar Heyerdahl estas norvego kaj tial verkis sian libron en la norvega lingvo. La Reĝa Norvega Konsulejo en Melburno informas min ke "Kon-Tiki" publikigis unue en la eldonejo "Gyldendal Norsk Forlag" de Oslo.

Rilate la statistikon pri aŭtomobiloj en Usono (p. 88, kol. 2), la usona vickonsulo de Melburno informas min ke (1-e) en 1953 vivis en Usono 159,959,000 da homoj, (2-e) ke en 1953 46,289,129 da aŭtomobiloj estis registritaj de privataj posedantoj, (3-e) ke el 49,400,000 da amerikaj familioj 35,000,000 posedas aŭtomobilon.—Herbert Koppel.

Mi plumeraris pri Kon-Tiki, pensante pri la SVEDA E-a eldonejo. Tiu eraro, kune kun la pacienco de nia AEA-sek-io, sendube rezultigis iom da bona propagando ĉe la Norvega konsulo! Por kio, ni dankas vin, s-ro K.

Pri aŭtoj en Usono, mi senkontrolis kopies el Franca gazeto. Pri niaj ciferoj legantoj mem cerbumu.

—F.R.B.

Nia altvalora kaj vigla reprezentanto D-ro Lapenna ricevis bonegan sukceson, pro kio ĉiuj E-istoj devas esti al li sincere dankaj. Tamen ni ne povas paroli pri venko, kaj se ni intencas atingi finan sukceson, ni devas serioze klopodi, por ke la registaroj de la ŝtatoj, kiuj favore voĉdonis al la Rezolucio, akceptu praktike la instruadon de E-o en siaj propraj lernejoj.

Se ni sukcesos en tiu celo kaj la ŝtatoj siavice povos raporti post unu aŭ du jaroj favore al E-o al la ĝenerala direktoro de Unesko, la fina venko vere alproksimiĝos, kaj niaj reprezentantoj havos ĉemane tiajn armilojn por batali, kiaj nuntempe tute mankas al ili. Nur tiam ni venkos, kiam E-o estos oficiale akceptita kiel lingvo internacia, kies instruado fariĝos deviga en ĉiuj lernejoj de la mondo.

Nia agadplano por la estonteco baziĝu sur penado starigi klasojn de E-o en ĉiuj eblaj lernejoj en Aŭstralio kaj samtempe akceptigi en gazetoj artikolojn pri la Konferenco en Montevideo kaj la favore akceptita rezolucio pri E-o.—C.J.C.

SUBSCRIPTIONS: Messrs. Grant, E. Hanks, I. Slavoff, Mills, N. Prewitt, P. Schwerin, N. Perkins, E. Costa, A. Towsey, Miles, Cameron, Cettini, Claxton, Finch, Hawks, Hicks, Hehir, Morton, Stephens, Dr. Fridenbergs—12/6; Rev. V. Rymer—13/-; Mesd. Wishart, V. Fidock, Hill, Jones, Capin-Collins, Pianta, G. Pollard, A. B. Sedgley, Hitch, M. A. Hill—12/6; Misses W. Addis, E. Styles, V. Newnham, E. Dash, Angwin, Chandler, Egan, Ladyman, D. Leach, A. Longson, Stempel—12/6. Thank you all!

Special appreciation to Messrs. C. P. Hehir, 40/-; A. Shain, 25/-; I. T. Maddern, J. Eliot, K. Hirschel; Mesd. Humphries, A. E. Turnbull, E. Klusendorf, Miss I. James, 20/-.

IMPORTANT !

Please make cheques payable to: Canberra Esperanto Club (Congress account). Add exchange.

Money orders as above, but at Canberra City P.O.

MIA PREGO — KRISTO BOTEV.

Dio mia, justa, saĝa,
Ne en la ĉiela foro
Sed en mia menso, koro,
Sed mi-memon enloĝanta;

Kiu ne el koto kreis
Stumblan paron, kies idoj,
Forlasite tra jarmiloj,
Svitis, larmis, ensklaviĝis;

Kiu dikte ne postulas
Sin-submeton, genufleksojn,
Nek promesas perlajn hejmojn,
Nek prudenton droge nutras;

Dio sed de mens' racia,
Batalanta por la sklavo,
Por la liberiga tago,
Por fratec' internacia;

Amon Ci en mi flamigu
Por justeco, por libero;
Kontraŭ trompo kaj malvero
Helpu ke mi brave luktu;

Donu al soldato Cia
Plian lerton, plian forton;
Donu ŝarĝon; donu morton
Se utilas, Dio mia.

Por vekigo de l' sklavaro,
Por mens-ĉenojn la forigo,
Ĝis mi falu, strebu mi do
Laŭ ne-estingebla ardo.

Reverkis el angla traduko.

—Joab Eljot.

PRO-VENKA DANK-CEREMONIO.

(Robert Burns, La Skota Famulo.)
Vi hipokritoj! Fi-ŝerco do ne mankas—
Homojn murdinte, vi jen al Dio dankas!
Ne plu honto; finiĝu la absurdo:
Dankon akceptos ja Dio ne pro murdo.
—En Esperantan: Joab Eljot.

NASKO.

Al S-ino Joan Gurney, plej juna filino de Joab Eljot, naskiĝis, ĉe la 26.IV.55, filo. S-ro Eljot intencas dekomence, uzi sole Esperanton inter sia mem kaj sia nepo.

EPITAFŬO DE AVARULO.

Li adiciis kaj multiplikis, sed neniam subtrahis. Liaj dankplenaj heredintoj—dividis.

HIROŜIMA FILMO.

Mankas teknika perfekteco al la filmo Infanoj de Hiroŝima, kiu provas montri la teruron de la atoma bombo. Tamen ĝi ŝiras la koron. Ĝi estas nebone redaktita kaj havas malmulte da fotografia arto. Malgraŭ tio, ĝi certe impresas pensemajn homojn kiel tre gravsignifa homa dokumento.

Ĝi montras nombron da transvivintoj de la Hiroŝima bombatako 1945, kiam 250,000 homoj mortis en minuto. Takako, infan-instruistino en H. ĝis la eksplodo, revene vizitas la urbon, kaj oni vidas per ŝiaj okuloj la Gehenecajn efikojn de la bombo inter la frakasitaj kaj kriplitaj restuloj de la urba loĝantaro.

Multaj el la scenoj estas diable animskuaĵaj, tamen oni sentas, ke ankoraŭ restas farende, ke iuj pli kompetentaj filmistoj produktu prezent-ajon, kiu taŭge kaj pli trafe ekspluatu tiun temon treege gravan por la homaro.

Malgraŭ tiu kritiko, oni povas forte rekomendi ĉi-filmon dokumentecan, kiu, kiel unua, pritraktas la komencon de l'atomepoko.

Prene luis ĝin en Aŭstralion la Peace Quest Forum (pacon-serĉa forumo).—Lau raporto en The Age, 6.5.

INSTRUISTOJ !

Elĉerpajo el letero de D-rino Vera A. Summers, prezidanto de la A.E.S.I.—“Mi ekiros meze de Aprilo alilanden, kaj vizitos la Esperanto Kongreson en Bologna en Aŭgusto. Dum mia vojaĝo mi intencas ankaŭ viziti lernejojn en Anglujo kaj aliaj landoj por eltrovi, inter aliaj aferoj, ĉu ili instruas E-on, kaj al kiom da lernantoj; ankaŭ kian lernolibron ili preferas.

“Mi mem uzas en klasoj de dek-unujaraj knabinoj, unue, ‘Sub la Verda Standard’, kiu estas lernolibro laŭ la rekta metodo, verkita de Nederlanda E-isto P. Korte. La pasintan jaron mi uzis ‘A Practical Course in Esperanto’, de D-ro F. Szilagy.

“Por infanoj mi multe preferas ‘Sub la Verda Standardo’. Cu aliaj instruistoj eksperimentas kun lernolibroj? Se jes, ni invitas ilin esprimi opinionon pri ili, kion ni povus publikigi en ‘Klarigo’ (nia organo).

“Mi esperas, ke, reveninte al Aŭstralio, mi havos ion interesan por diri

al vi pri la Kongreso, kaj pri lernejoj kaj lernmetodoj en aliaj landoj.” Informu vin pri A.E.S.I. ĉe Mrs. G. Pollard, 128 Raglan Rd., North Perth.

La pacista vietnamano, VO, kiu fastis en Genevo, atestante la angoron de siaj samlandanoj, estas ekzemplo de homo prenanta sur sin la afliktojn anstataŭ suferigi aliajn kunhomojn. Li humile biciklis tra Eŭropo, parolante france kaj Esperante por koni la simplajn homojn, kaj vizitis la Kongreson de Mondialistoj. Sen timo. sen malamo, li traktis ĉiun fratece. Antaŭ lia pura animkulturo kaj delikata sentemeco, la homoj murmuris: “Kion ni Okcidentanoj povus fari en Azio, ĉe homoj de tia spirita nivelo?” Ni havas ankoraŭ multon lerni de tiaj homoj, ma'graŭ niaj krucifiksoj kaj predikoj, kiuj jam devus esti instruigitaj al ni ion pri la psikologio de la Kruco. “Ni faris el la Kruco teologio; Gandij el ĝi faris metodo”, diris misiisto D-ro Stanley Jones.

—D-ro Ed. Privat.

-INO?

Laŭ internacia kutimo estas bone uzi “sinjoro” aŭ “s-ro” je viro, negrave ĉu edzo aŭ needzo; ni uzu “sinjorino” aŭ “s-ino” je virino edzina, kaj “fraŭlino” aŭ “f-ino” je needzino. Tamen simile al “lady” en la angla, la vorto “sinjorino” ne ĉiam kaj necese indikas, ke la virino estas edzohava. Ekzemple, ni povas diri, ke “hodiaŭ mi ricevis leteron de nekona-ta sinjorino”. Ne gravas la demando, ĉu au ĉu ne ŝi estas edzino. Zam, je la 2a kaj 3a kongresoj malfermis per “Sinjoroj kaj sinjorinoj!”

Butler (“Step by Step”, p. 23, 4a eld. 1933):—“Like ‘lady’ in English, the word ‘sinjorino’ does not necessarily mean a married woman.”

ETECO.

—Ce amuzfoiro: “Cu vere vi nomas lin nano! Li estas preskaŭ tiel granda kiel normala homo.”

“Ja fakte! Guste en tio frapas la sensacio: li estas la plej granda vivanta nano en la tuta mondo!”

JAPANESE CORRES. CLUB asks for Esperantist penfriends. Internacia Korespondanta Klubo, c/o Osamu Take-mura, 10, 2-chome, CHODO, Fuse-ŝi, OSAKA-FU, Japan.


La Rondo

The Australian Esperanto Monthly

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 12½\$ (aŭ 20 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 4\$.



Redaktoro: F. R. BANHAM, 2 Banchory St., Essendon, W.5, Victoria.
Adreso de A.E.A.—Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.

Kasisto: E. McKenzie, 117 Mitchell St., Northcote, N.16, Vic.

Vol. 12, N-ro 67.

MELBURNO.

Majo-Junio, 1955.

ESPERANTO IN THE PALACE OF THE NATIONS, EUROPEAN OFFICE OF U.N. IN GENEVA

Universal Esperanto Association Represented in Conference of
Non-Governmental Organisations interested in the Eradication of
Prejudice and Discrimination.

Convened by the Economic and Social Council of U.N., the above conference sat from 31st March to 4th April. The President was M. Vincent Auriole, former President of France (who signed the Esperanto Petition); representatives of U.E.A. were Messrs. Alfred Rehmann and Ralph Harry, Australian Consul-General to Switzerland, and Permanent Delegate to the European Office of U.N.

The Secretariat prepared a 2-page document, compiled by Mr. Harry, concerning the aims of Esperanto and its role relating to the three aspects of discrimination based on lingual diversity: (a) denial of human rights; (b) discrimination against users of the international language itself, and (c) discrimination against the minor languages at conferences and international organisations.

Mr. Rehmann addressed the second meeting of the conference. Those present showed great interest when the President announced the representatives of the U.E.A. Mr. Rehmann, who spoke in French, handled the same themes treated in the document. He informed the conference of the Esperanto translation of the Declaration of Human Rights and read in Esperanto Article 2 (1) of the Declaration. Finally he invited

all organisations to further the learning of Esperanto among their members and to use it at their meetings.

A full report of Mr. Rehmann's speech was entered into the Summary Record, and the complete text were distributed to the representatives and to the journalists. The greater part of those present knew next to nothing about Esperanto before the conference. Afterwards two hundred persons, many of them outstanding personalities, realised that the U.E.A. is an active and vital organisation.

To several of these the delegates of the U.E.A. took the opportunity to speak of the possibilities of Esperanto for use in their work. To others they explained the network of U.E.A. delegates; to yet others they gave the text of the Resolution of UNESCO. Many present will mention in their reports to the Non-Governmental Organisations, which they represent, the fact that the U.E.A. delegates were present at the conference.

Following the conference of the U.E.A., delegates sent to the headquarters of each of the 100 organisations represented the text of the resolution adopted by UNESCO, the Esperanto translation of the Declaration of Human Rights, a copy of the

Report on Esperanto prepared by U.E.A. for UNESCO, a list of addresses of Esperanto organisations and a letter asking the organisations to inform their national affiliated societies about the possibilities of Esperanto.

Already the International Federation of Catholic Youth has replied from Rome that it will recommend the study of Esperanto to the national groups associated with it and will send to them the addresses of regional centres of U.E.A.

During the recent session of the International Labour Conference in Geneva both the two Australian Government representatives, Mr. R. L. Harry and Mr. Brentwood, asst. sec. Dept. of Labour and National Service, Melb., were Esperantists. They recorded in the Palais de Nations a talk on the conference in Esperanto for the Swiss short-wave radio.

During the Big Four Conference one member of the United Kingdom secretariat and one member of the secretariat of the U.S.S.R. were Esperantists and were able to converse in Esperanto. The Australian Permanent Delegate recently gave a showing in Geneva of the film AUSTRALIA TODAY with Esperanto commentary. The secretary of the U.N. Technical Assistance Board and his wife, both Esperantists, were present.

La Internacia Asocio por Socia Sekureco eldonas specialan numeron de sia gazeto "Novajoj pri Socia Sekureco" en 2500 ekzempleroj, el kiuj 1500-2000 iros al Bologno kaj 200 al Aŭstralio!—Ralph Harry, 41 quai Wilson, Geneve.

SIDELIGHTS ON THE SUCCESS AT MONTEVIDEO

The Real Significance of a Valuable but Limited Recognition.

The passing by Unesco of the Resolution favorable to Esperanto is an important step towards a solution of world language problem, and a valuable encouragement and recognition for those who have been using Esperanto usefully in a number of fields. The success at Montevideo is due to the intrinsic validity of Esperanto's claims, its achievements, and the impressive support which the Petition had secured. It is due, fur-

thermore, to the efforts of Professor I. Lapenna and Professor M. F. Menendez, Dr. W. Solzbacher, Mr. Mark Starr and Mr. E. D. Durrant, chief among many who worked hard for the pleasing outcome.

In February, 1953, Unesco sent a letter to all Governments, asking them to supply "any information, views or observations which your Government may wish to furnish," especially on "how far the teaching and use of Esperanto extend in your country, the results obtained, and what practical plans, in your Government's view, should be submitted to the General Conference at its 8th Session to give effect to the hope expressed in the attached Petition." Replies came from 38 Governments. Ten were completely favorable and recommended that Unesco take action in favor of Esperanto. A few of the others were outspokenly negative, but a substantial majority were non-committal. Some feared that Unesco, warned to restrict its activities to a few vital fields with its limited financial resources, might embark on something in connection with the Esperanto Petition that would cost a lot of money. This fear was probably the most important factor against positive action for Esperanto; the budget-conscious delegates at Montevideo were determined to avoid new projects that might require more than nominal expenditures.

The fact that the teaching of Esperanto in the schools was stressed in the Petition worried some delegates from countries whose systems do not give the central Government control over the school curricula. In U.S.A. the Federal Govt. has no control over what is taught in the schools. Similarly in Canada, Switzerland, several Latin American lands, and, to a lesser extent, in the U.K.

Another unfavorable circumstance in Montevideo was that delegations to Unesco conferences are appointed by the Foreign Ministers, while Government action favoring Esperanto has in some cases been taken by Education and Commerce depts. It sometimes happens that the right hand doesn't know what the left hand has been doing. A striking example of this was Denmark. One of the Danish delegates in the Pro-

gram Committee violently opposed Esperanto while at the very same time in Montevideo, where the Conference was held, a motion picture with Esperanto text was shown, produced by the Danish Government to attract tourists.

These drawbacks were, however, more than counterbalanced by favorable factors. The pro-Esperanto attitude of the daily press in Montevideo and the dynamism of the Uruguayan Esperanto Society made themselves felt. Just before the final vote, the British delegation announced that it would vote for the Resolution; this may have swung other votes in our direction.

The vote, 30 to 5, with 17 abstentions, was a great moral victory. Under the terms of the Montevideo Resolution Unesco will be obliged to pay attention to the future progress of Esperanto in all fields. It recognises the actual achievements of the language. But with the Esperanto movement itself, with its supporters everywhere, will remain the responsibility of teaching and promoting it, planning its extension in every phase of human endeavor, of overcoming prejudice or indifference, and in general of fortifying its position in the world. Unesco has not taken over those tasks, nor pledged its financial or organisational support, nor decided to use it in its publications. It has, however, in a very real way approved the aims and claims of the language, noted its accomplishments and shown its willingness to follow future developments with interest, because the results obtained by Esperanto "are in accordance with the aims and ideals of UNESCO."

—From "Amerika Esperantisto,"
January, 1955.

PAGO 88

Kiu de l'denaska tero neniam vagas for,
Kaj ne serĉas trans landlimoj belaj-ojn lia kor';
Kiu nur por propra lando klopodas pri la bon',
Fremdajn homojn li mokante ofendas per la ton'.
Kiu ne amikojn volas en lando trans la mar'—
Kiel servas li la pacon fratece por l'homar'?

—Ken Linton.

Australia Kroniko

● SYDNEY: En Januaro kaj Februaro, ni laboris ĉefe per varbi lernantojn al la nova kurso. Ni sendis leterojn al multaj organizaĵoj kaj kluboj—al tiuj, kiuj havas ian internacian senton — ekzemple, YWCA, Rotary, Red Cross, kun la ideo, ke eĉ se la anoj neniam venos al la Klubo, almenaŭ ili scios, ke Esperanto vivas.

Ankaŭ la klubanoj disdonis, kun sama celo, milojn da flugfolioj pri la kurso kaj aliaj klub-araĝoj.

Ni ĝojis bonvenigi al Sidnejo S-inon Barlow, entuziasma kaj laborema Esperantisto el Adelaide. Ni deziras al ŝi longan, feliĉan restadon en Sidnejo.—ke la hejmsopiro ne retiru ŝin al Adelaide!

En Januaro, tri vizitantoj — Ges. Wiltshire kaj S-ino Humphries—portis al ni salutojn el Aukland. Ni ĝojis renkonti tiujn eksterlandanojn.

La Societo ricevis inviton de Junulgrupo en Summer Hill, fari prelegon pri Esperanto. Nia ĉiam-preta samideano Jim Davidson parolis; la ĉeestantoj tre interesiĝis, kaj vigle demandis pri la idealoj kaj la praktika flanko de Esperanto.

Vizito de S-ro Gamble, kun novaĵo pri la Kongresplanoj, estis tre plaĉa okazo.

La Jarkunveno okazis 28 Feb-o, kaj oni elektis la jenajn oficantojn: Prez.: S-ro Matasin; Vic-Prez.: S-roj Chandler kaj Zvara; Sek.: F-ino Dash; Bibliotek: F-ino Smith, kiel en la lasta jaro. Novaj servuloj estas Kasisto: S-ro H. Long; Vic-Prez.: S-ro Hamilton-Webber; Soc. Sek.: S-ino L. Long.

Je la nomo de la Societo, la prezidanto dankis al ĉiuj, sed precipe al S-ino Klussendorf pro ŝia longa kaj fidela servo (16 j.) kiel kasisto. Pro tio la hejmozorgoj, ŝi devis lasi la postenon, sed partoprenos nun kiel ordinara membro.

Krom la elektado, la ĉefa diskuto estis pri rimedoj por divastigi informon pri Esperanto inter la popoloj. Post provo de la sugestoj, ni raportos pli pri tio.

Je 5 Marto estis speciala kunveno, kiu celis varbi anojn al la nova kurso por komencantoj. Nia ĉiekonata amiko S-ro Simpkins el Anglujo

oportune estis en Sidnejo. Li volonte parolis al la ĉeestantoj pri siaj freŝdataj spertoj en Esperantujo. De la NSW Film Council, ni havigis bonegan filmon, "Bildo en Via Mens-o." Temas pri la komuneco de la homaranoj, ilia deveno, naciaj antaŭjuĝoj, ktp. Alia rekomendinda estas "Homa Frateco"—desegnita, kolorita, sciiga, kaj ĝuinda.

S-ro Perry prelegis en kunveno de la YMCA Internacia Grupo, kaj vekis grandan intereson. Bedaŭrinde, ilia kunveno okazas samvespere kiel nia. Tamen, la Movado rikoltos poste.

La Kurso komenciĝis je 14 Marto, kaj ŝajnas tre esperplena.

Je 27 Marto, Ges. Loorits alvenis al la Klubo dum halto en sia vojaĝo al Kanado. Ĉiuj tre ĝojis aŭdi pri iliaj spertoj. La novbaktaj enspiris el la parolado freŝan energion kaj ideojn. La sinjoro montris al ili kiel li komencis korespondadon post tre malmultaj lecionoj.

En nia Aprila amuzvespero, S-ro Matasin montris belegajn lumbildojn pri Lord Howe kaj Hayman Insuloj. La vidaĵoj vere mirigis nin, hejmrstantojn.

Tre interesa prelego de S-ino Barlow pensigis nin pri la diferencoj kaj similaĵoj inter popoloj, kaj sugestis kialojn de kelkaj karakterizoj. Si ankaŭ prelegis pri Esperanto al grupo de Militrezistantoj. Vigla interparolado sekvis, kaj la anoj montris sin tre simpatiaj.

Nova Traduk-grupo nun funkcias, sub gvido de S-ro Chandler. Ĉiunmonate ni kune tradukas pecon, per komuna laboro, kaj tiel helpas unu la alian plibonigi nian lingvoscion.

La alveno de S-ro Volvo Gŭltling, juna, sperta Esperantisto el Germanujo, estas grava kaj ĝojiga gajno. Li transdonis al la Aŭstraliaj Esperantistoj salutojn de la samideanoj en Hamburgo. Gojoni kaj feliĉon al li en lia nova hejmo! —E.D.

● **ADELAIDE:** La loka grupo regule kunvenas ĉiumerkrede ĉe la universitato. Pro fuŝaraĝo pri horoj fare de la W.E.A.-a aŭtoritatoj, la antaŭa kunvenloko, la A.W.A. Hall, ne plu estas oportune uzebla. La grupo do nun kunvenas en malkomforta klas-ĉambro ĉe la universitato mem. Oni ne povas pridubi la fervoron de la grupanoj. Malgraŭ ĉiumerkreda pluvego, preskaŭ neniuj forestis de la kunvenoj. F-no Kemp-

son tamen havas sian apartan prive-teran opinion; sed ŝiaj komentoj tute ne estas preseblaj.

Oni rimarkas grandan pliboniĝon en la parol-kapablo de la progresintoj. Ĉiuj parolas kiom plej eble esperante. Kaŭzas tion eble la babilemo de iu samideano.

S-ro Fidge sukcesis en B.E.A. Elementa Ekzameno, kun honoro. Jam li eklevas la piedon por supreniri la ŝtuparon al la Diploma, sed kelkaj malfacilaĵoj sin prezentas tiurilate.

Kelkaj rigardas antaŭen al la kongreso . . . sed tempo kaj la poŝo faros la finan decidon.

Malfeliĉe ni ankoraŭ ne povas pligrandigi nian nombron. The malfacile estas varbi novajn adeptojn. Kelkaj tiucelaj reklamoj tute ne estis fruktdonaj.—H.W.F.

● **CANBERRA:** Spite de malgranda anaro kunvenoj okazas ĉe "Riverside Kultura Centro"; ankaŭ la klasoj dauras. Ĉefa agado en la nuna tempo estas la preparo de la venonta Australia Esperanto-Kongreso. Raportetoj aperas de tempo al tempo en la loka gazetaro kun mencio de la okazonta kongreso. Ni sukcesis havigi la grandan "Albert Halon" por la vendredo de la kongres-semajno (6/1/56) por la granda "Internacia Koncerto", kunlabore kun la "Bon-Najbara Konsilantaro".

Bonvena vizitanto al Canberra estis S-ino Grace Barlow, el Sidnejo, kun kiu ni ankaŭ priparolis kelkajn kongres-aranĝojn.—Harry Torr.

● **BRISBANE:** La Brisbana E-Societo prezentis sian raporton por la periodo Aug. 1953 ĝis Marto 1955. Ĉe la ekpreno de la gvidiloj de la Societo, laŭ la ne tre preciza informo je dispono, la societo kalkulis ĉ. 30 anojn. La nova estraro opiniis ke E-Societo devas sin okupi unuavice pri la disvastigado de la lingvo kaj tial sciigis ke moto estu "Forlasu la Anglan antaŭ ol enveni la klubejon." Post tiu edikto, la plejmulto de la 30 anoj forlasis ne la Anglan, sed la Societon. Bedaŭrinde restis nur du tri personoj por plenumi ĉiujn laborojn kaj devis streĉe kaj forte labori. Sed ili sukcesis kaj nun sur firma tero—finance kaj Esperantisme—staras nia societo.

Post 18 monatoj nia bankkredito estas £43, pliiĝo de 884%. La membraro nun staras je 17 kaj ĉe kun-

sentojn de la aŭstralia samideanaro pri la historia evento ĵus okazinta en Montevideo.

Profesoro Ivo Lapenna, sen ia ombro da dubo, estas la heroo de la nuna momento. Efektive, per lia grandega faro ĉe UNESCO li fariĝis unu el la plej elstaraj ĉampionoj en la tuta historio de nia kara movado.

Ne nur li havas treege vastan konon pri nia afero, ne nur ardas en lia sindona brusto tiel forta kaj entuziasma amo al la zamenhofa lingvo, ne nur li posedas la talenton sin tiel elokvente esprimi, sed lia animo transcendis ĉiujn imagojn en sia rifuzo agnoski malvenkon.

Kiam espero ŝajnis tote perdita; kiam la plej nigregaj nuboj amasiĝis sur la horizonto kaj kasis ĉian lumeton, li faris la nefareblan spite de kolosa kontraŭstaro.

Tia fido, kian posedas ĉi tiu dinamika homo, neniam rekonante malsukceson, soris super ĉiaj baroj, kaj atingis tiel mirigajn altecojn, ke li efektivigis por la Esperanta ideo miraklon, kiu meritas la senfinan dankon de ĉiu samideano en la mondo. Al la laŭdoj de tiu grandega anaro ni nepre deziras aldoni nian voĉan tributon al ĉi tiu alte honorinda filo de Esperantujo, Profesoro Ivo Lapenna, kiu tiel glorie kaj neforigeble ĉizis sian nomon sur la plej taŭga monumento, la vivantaj koroj de la veraj disĉiploj de Zamenhof.

Via prezidanto,

KEN G. LINTON.

PREMIO MASEL POR 1955.

Al ĉiuj Esperantistoj en Aŭstralio kaj Nov-Zelando.

PROZA KONKURSO.

PREMIO: £5 por la plej bona originala literatura verko en Esperanto. La temo estas tute libera; inter 1000 kaj 1500 vortoj. Fermdato: la 30a de Septembro, 1955.

Ni anoncos la rezultojn en Decembro. Mi krome informos individue la konkursantojn per poŝto pri la rezultoj, kaj la Premio iros al la venkinto.

La juĝon, sen rajto apelacia, faros juĝanto elektota de la Komitato de la Ligo.

La Kandidatoj devos sendi siajn verkojn titolitaj, sed sennomaj, kaj

aparte devos enmeti en kovertojn, sur kiu estu skribota la titolo de la verko, papereton kun la kompleta nomo kaj adreso de la aŭtoro. Nur tiel ni povos konservi la sekreton de la nomoj. La aŭtoro devas konservi kopion por sin protekti kontraŭ eventuala perdiĝo de la sendita ekzemplero.

La verkoj devas esti maŝinskribitaj kun interlinia spaco, aŭ tre klare manskribitaj.

Se nur unu verko estos ricevita, la sekretario nuligos la konkurson por tiu jaro, kaj konservos la verkojn por la konkurso en la sekvanta jaro.

Neniu Esperantisto kiu jam dufoje gajnis la Premion rajtas partopreni. —(S-ino) R. McGrath, 41 Reynolds Road, Applecross, W.A.

FRUA INTERNACIA LINGVO de Pastro C. C. Cowling.

En la kulturo de la mondo efikan rolon ludis internaciaj lingvoj. Ni E-istoj tro facile supozas, ke "nia afero" estas relative nova, kun rilato al Solresol aŭ Volapuk aŭ Ido, aŭ iu simila lingvoj; sed kontraŭe, internaciaj lingvoj jam antaŭ jarcentoj vastiĝis tra la civilizita homaro kaj influis, ne nur unu epokon, sed ĉiujn epokojn de la historio.

Ce niaj universitatoj oni povas studi la belan kaj riĉan klasikan grekan. Jarcentojn antaŭ Kristo tiu nobla lingvo de antikva Grekujo, tiel riĉa kaj bela, tiel esprimipova kaj dolĉa, fariĝis la vortmedio de nemorteblaj pensoj kaj beletristikajoj. Sed en la 4-a jarcento antaŭ Kristo, Aleksandro el Macedonoj venke iris tra la mondo, renversis la Persan Imperion ĉe Arbela, detruis la gloran urbon Tyre, trapasis okcidentan Azion, kaj eĉ penetris en Egiptujon, kie li fondis novan mondĉefurbon Aleksandrio. Pro tio la greka lingvo ĉesis esti la lingvo de la propraj montovaloj, kaj vastiĝis tra la mondo.

Aleksandro mortis en 323 A.K. kaj baldaŭ lia vasta imperio estis regata de kvar sendependaj reĝoj, kiuj antaŭe estis generaloj de la fama macedono. Tiam, kvankam Grekujo mem jam ne havis pacan rilaton kun la aliaj imperioj, la civilizita mondo estis sub la potenco de grekaj regantoj kaj ĉi ties greka kulturo. Post la soldatoj, sekvis la grekaj komercistoj, kaj grekaj koloniistoj alvenis

por loĝi en la nove venkitaj landoj. El la kolonioj de greklingvanoj disvastiĝis ĉiudirekten, por pretermezure influi ĉiujn popolojn, la greka kulturo.

Poste, la greka reĝlando en Azio ĉesis ekzisti, kaj Romo etendis sian feran manon al la nacioj; sed la greka lingvo, kiu jam troviĝis ĉiuloke, daŭre sorĉis ĉiujn, ĉiam pli vaste koniĝis, kaj fine venkis Romon mem, tiel ke ĝi fariĝis la lingvo de la Reĝaj Kortumoj, la lingvo de komerco, la lingvo de la lernejoj kaj de la ordinara homo.

Tamen, la greklingvo, kiu tiel fariĝis internacia, la dua lingvo de ĉiuj homoj, ne estis la lingvo de la klasika periodo, de Homero nek de Demosteneno. Beletristikaj jonglaĵoj ne povis resti en armeoj tiel klanriĉaj, kiel tiuj de Aleksandro. Oni uzis, ne la klasikajn dialektojn sed la popolan lingvon, kiu ĝis tiam troviĝis literature nur en la komedioj. Nun ĝi fariĝis la lingvo ankaŭ de historiistoj kaj filozofoj.

Sendube tiuj, kiuj denaske uzis la grekan, povis nur profiti el ĝia disvastiĝo. Ili ne hezitis propagandi ĝian uzon ĉiudirekte. Efektive, iuj regantoj propagandis eĉ per la glavo kaj karcero. Sed tre rimarkinde estas, ke la jam antikva lingvo povis forte entuziasmigi multajn, al kiuj ĝi estis nova, eĉ Azianojn, Hebreojn kaj Afrikanojn, kies pensformoj estis ĉiel malsamaj, ol tiuj de eŭropa lingvano. Ĉi tiuj, pro entuziasmo pri la greka lingvo kaj kulturo, establis grupojn kaj ligojn kiujn nuntempe E-isto facile komprenus. Komprenoble, multaj en la aziaj landoj bedaŭris la vastigon de fremda kulturo kaj lingvo nenacia; ĉi tiuj, malŝatate de la "helenistoj" (tiel nomiĝis tiuj, kiuj akceptis la novan kulturon), komencis kontraŭpropagandi ofte perforte. Iu, kiu volas kompreni multajn partojn de tiutempa literaturo kaj multajn partojn de la Biblio, devas porti enmense tiujn faktojn.

Ofte oni kritike diras pri Esperanto, aŭ iu ajn alia lingvo, ke ĝi plimalpli baldaŭ disiĝos en diversajn dialektojn. Se en la moderna mondo tio estus probabla, estus tamen pli ol interese noti, ke historie tio ne necese okazus; ĉar unu el la plej notindaj faktoj pri tiu antikva internacia lingvo, kiun mi ĉi tie konsideras, estas ke ĝi restis dum jarcentoj pres-

kaŭ tute sen dialektoj. Eĉ pli, ĝi iom post iom forpuŝis la dialektojn de Grekujo mem kaj fariĝis io simila al universala (kontraste kun internacia) lingvo, tiom, ke, kvankam aliaj naciaj lingvoj fine asertis sin, tiu kiu ellernis ĝin povas sen troa malfacilo legi modernan grekan—ĝian rektan posteulon.

Hodiaŭ, tiu Esperanto de la antikvuloj ankoraŭ ricevas multan atenton. Ĝi troviĝas ne nur en fruaj historioj, en surskriboj el la tiutempa mondo, en la sennombraj manuskriptoj de la Nova kaj Malnova Testamentoj, sed ankaŭ en la miloj da papirusoj elfositaj en modernaj jaroj. Tiuj nove trovitaj papirusoj estas trispecaj: literaturaj, bibliaj kaj popularaj. Ĉiuj estas interesaj, sed eble la lastaj estas la plej gravaj, ĉar el ili ni povas lerni, kiel homoj tiutempaj komprenis la vortojn, kiujn oni uzis en literaturaj kaj bibliaj verkoj. Ili konsistas el oficialaj dokumentoj, imperiestraj ordonoj, juĝistaj protokoloj, impost-formularoj, edziĝkontraktoj, eksedziĝo-atestaĵoj, avizoj pri mortoj aŭ naskiĝoj, privataj leteroj de lernejar buboj amantoj, forestantaj edzoj, k.t.p. Efektive, tiu internacia lingvo uzis mondscale por ĉiu bezono de homoj, kiuj ĉiel similis nin, havis niajn emociojn, suferis kiel ni, kaj ĝojis kiel ni. Legante ĝin oni pli frape ol iam ekkonas la fakton esti kunfrato de ĉiuj homoj, ne nur en ĉiuj landoj, sed en ĉiuj epokoj.

(La ĉi-supra prelego estis laŭlegita dum la 9-a Aŭstralia E-Kongreso en Perth.)

Tra La Mondo

AUSTRALIA: "Current Notes on International Affairs" (Canberra) lists the Esperanto World Congress at Bologna—with a Govt. observer.

AUSTRIA: Education Minister for Educ. grants money to Austrian Soc. of Esp. Teachers.

BRAZIL: Education chief in Pernambuco urges elementary and high school teachers to learn Esperanto.

FINLAND: Editor of "Every Boy's" (Joka Poika) gets 1600 requests from readers of Esperanto lessons he is running. Organ of Finnish Teachers' Assn. gives Esp. section twice a month.

FRANCE: Growing number of city councils vote resolutions for Esp. in school curricula.

Jules Verne was honorary pres. of the Esp. club in Amiens, where he lived. He planned a novel in which Esp. would have played important role but died before he could write it, in 1905, at 77.

GERMANY: Hans Seebohm, West German Transport Minister: "I consider Esp. a means of decisive importance for establishing a solid base of understanding among men and nations. I shall continue to welcome any activities in favor of it."

HOLLAND: Two encyclopedias, Winkler-Prins and Katholieke Enc., have detailed articles on Esp. by G. P. de Bruin and Dr. W. Manders respectively.

INDONESIAN fashion expert in Cologne and Godesberg gave explanations in Esp., translated into German by local helpers.

ITALY: National Esp-ist Cinema Centre is set to handle Esp. documentaries. NEKC, Dr. Borzani, via P. Palagi 7, Milano.

Clelia Garibaldi, descendant of the famous Giuseppe, wrote to Milan group: "Esperanto will lead future generations to a genuine unity of Europe."

"Australia Today" (Esp. doc.) shown in 22 cities.

JAPAN: Botanic Society gives summaries in Eng. and Esp. in its paper.

SWITZERLAND: "Co-ordinated Esp. Classes" founded in People's Unis. and Adult Educ. centres of 21 cities in 10 lands. Exchange of correspondence and visits among students have markedly contributed to international understanding.

U.S.A.: "Cio pri Lingvoj" (All about languages) is title of new book by Prof. Mario Pei, who favorably mentions Esp.

SUBSCRIPTIONS: Thanks to Messrs. Strassberg, P. A. Oliver, Podenas, Gottlieb, P. Holmes, Dr. and Mrs. Einihovici, 12/6; C. Ramsay, 15/-; Mesd. Le Coultre, Bennett, Daniels, H. McGrath, Fink, 12/6; Sainsbury. 15/-; Misses Woolley, A. Godfrey, E. B. Carrick, 12/6. Sales Rondo, 5/-; Amerika Teo, £5/15/3.

Special thanks to Mr. Latimer, Misses E. Bull, F. Kemp and F. Smith, 20/-. We are indeed grateful to Mr. J. Neill Prewett, who sent £4/14/3 as the sub. of five overseas readers.

OLIMPA - IA - IKA - IADA?

Lastatempe mi renkontis vere orelmordantan fuŝajon. Temas pri la tiel nomitaj "Olimpikaj Ludoj". Olimpikaj! Ho mia sankta Pankreaso!

La du ĉefaj anglaj vortaroj donas la formon, "Olimpa". Ŝajne, ankaŭ tio ne estas entute kontentiga. Tiuj ĉi ludoj, kiom mi povas informiĝi, okazis ĉe Olimpio (Olympia). La formo, Olimpio, troviĝas en la Enciklopedio de Esperanto ĉe la fino de artikolo pri Grekujo verkita de D-ro Stamatiadis, greko. Do, miaopinie, la korekta formo devus esti "Olimpiaj Ludoj".—Joab Eljot.

Rimarko de la red. Zamenhof uzis "Olimpo" ĉe Fabeloj vol. 1, 146; Hamleto 153; Ifigenio 39. Wingen donas por Olympiade: olimpiado. Butin & Sommer—same kun rimarko: tempo kvarjara inter du (olympischen Spielen); ankaŭ, la ludoj mem. Milidge donas Olimpo por Olympus, kaj olimpiado por "an olympiad". La suplemento al la Plena Vortaro donas: olimpikoj: 1. Helenaj sportkonkursoj en Olimpio. 2. Modernaj sportkonkursoj, okazantaj ĉiun kvaran jaron, inter ĉampionoj el ĉiuj landoj (t.e. olimpiaj ludoj).

"La triumfo en Montevideo malaltigos la naciajn lingvojn je la rango de dialektoj, kiuj rapide malaperos pro la granda supereco de Esperanto" tiel verve fervoras nia internstena kolego C. DAGLIO, en cirkuero el Italujo.

Ho se la entuziasmo estus pli egale dote-disdonata al la Esperantistoj! Iuj ĝin havas superflue.

Principe Vjetmin batalas kontraŭ Vjetnam, aŭ pli ĝuste, Vjetnamanoj kontraŭ Vjetminanoj. Sed okazas, inter du bataloj, ke Vjetminanoj edziĝas kun Vjetnamanoj; se plue ni pripensas, ke ĉiuj, por ne morti, bezonas vitaminojn kaj, por pluvivi, evitas minojn, estas pli sage ne implikigi en tiun kaŝon.

—Raymond Schwarz.

La Ronda

The Australian Esperanto Monthly

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 12½\$ (aŭ 20 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 4\$.



Redaktoro: F. R. BANHAM, 2 Banchory St., Essendon, W.5, Victoria.

Adreso de A.E.A.—Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.

Kasisto: E. McKenzie, 117 Mitchell St., Northcote, N.16, Vic.

Vol. 12, N-ro 68.

MELBURNO.

Julio-Septembro, 1955.

ESPERANTO AND THE SCHOLAR

By Rev. C. C. Cowling, Lismore, Victoria.

Great movements, like Christianity and Communism, which have influenced mankind for weal or woe, have for the most part been movements of the people. So it has been with Esperanto. In writing to me recently a scholar of world-wide repute mentioned in appreciative terms a visit he had paid to an Esperanto group. He said, "One thing that struck me was the essential 'common people' nature of the society . . . I was almost going to say 'common-place', but that would have been the one thing they were not."

Some scholars, failing to understand the down-to-earth and practical nature of Esperanto, have given themselves to most unscholarly sneers. But other men of learning have realised what an asset to students the international language can be. The result is that several universities of good standing encourage both the learning and use of Esperanto (1).

For example, Liverpool University grants a scholarship to Esperantists each year; a few years ago an Australian, Dr. C. J. Caldera, won this award. The University of Geneva will consider a thesis written in Esperanto by properly qualified students for its degree of Doctor of Philosophy. May the day come when an Australian, planning a trip to Europe, will attain this high distinction.

But even the stay-at-home Esperantist has at his disposal a unique instrument for fostering learning. I have found, not only that through Esperanto I have been able to obtain research information otherwise procurable only by the wasteful procedure of mastering some less important national languages, but have also been able to translate articles which learned, technical and other journals have been eager to publish.

Again, even some very capable Esperantists are unaware of all the topics that may be studied in the international language. Apart from a considerable literature on language studies and political questions there are such essays as these, taken at random from my shelves:

Fotografa Optiko—a technical work original in Esperanto.

La Kaŭzo de la Senlaboreco—a careful study of the theories of Malthus.

"Mia Nuna Sintenado pri Apendicito", by a professor of surgery in New York Postgraduate School and Hospital.

"Pri Estetiko en Medicino", from the Polish. "La Kirgizoj" and "El la Proksima Oriento", two ethnographic studies.

"Historio de la Ex-libris'oj"; "La Mondpercepto de la Rozkrucaĵoj"; "La Libro de Komuna Preĝo"; "La Vivo de Jesuo" (Renan); "Kio Estas la Eklezio de Kristo?"; "Etiko", P.

Kropotkin's famous work; "Devoj de la Homo" (Mazzini); "Pri la Origino de l'Homo" (Sir A. Keith); Gregg's Shorthand; "Konsiloj pri Higieno"; "Monadologio" (Leibnitz).

There are many other works of importance in their particular field such as, "La Nuna Stato de Evoluismo" (Rostaud); "Mistero de l'Sango" (Battaglia); "La Praktiko de Aŭtosugestio" (Baudouin); "La Homna Lingvo" (Prof. Collinson); "Evoluo de Telefonio" (Isbrucker); "Atako kontraŭ Gardenplantoj" (Dr. Neergaard). These serve to show, not only the downright practicality of Esperanto and Esperantists, but the use made of the language by scholars of note, as well as its service to scholars.

To conclude, let me quote from a report from a Phyto-pathological laboratory in Denmark: note the words I have underlined:—

Nova malsano (tiga kaj folia putro) de Kalanchoe Blossfeldiana, kaŭzita de speco de Pythiaceae, estas konstatata La du fungoj sur la semoj de rafaneto probable ĝis nun **ne estas priraportitaj.**

Esperanto should not be regarded by scientists and scholars as just another language to be learnt, but one which, used by progressive thinking men, should serve to enable them to share all that inquiring minds can discover and reveal to their fellows the world over.

* * *

(1) According to "Esperantologio" there are chairs of Esperanto in Austria, Innsbruck, Vienna, Graz; Britain: Liverpool. Czechoslovakia, Praha, Bratislava. Germany: Hamburg, Mainz, Muenchen, Giessen. Jugoslavia: Zagreb. Japan: Kobe, Osaka, Otani. Korea: Chunggu, Taegu. Netherlands: Amsterdam. Poland: Cracow, Lodz. Lectorates are too many to mention here. In these cases instruction is given outside the province of the Chair.

REDAKTOROJ!

Sendu gazetojn, librojn kaj ceterajn REKTE al F. R. Banham, 2 Banchory Street, Essendon, W.5. Victoria, Aŭstralio, por ke li povu senprokraste pritrakti aferojn.

Bonvolu ne plu ignori tiun alvokon!

EKSPOZICIO EN MELBOURNE UZIS ESPERANTON.

Prezentiĝis en Melbourne inter 25/8 kaj 3/9 Ekspozicio duflanka. Unu parto disponis al ekspoziciaĵoj de diversaj Melburnaj societoj por modeloj; la alia al internacia komercado. "Kiel do tio temas pri Esperanto?"—jen la respondo!

Trovigas, ĉe Melburna Radio-Studio 3UZ, teknikisto S-ro Stan Milligan, kies multaj interesoj inkluzivas kaj modelojn kaj Esperanton; je la komenco de la Ekspozicia organizado li enhavis ideon uzi Esperanton por reklami internacie la aferon. Tiel bone li faris, ke, kiam oni prezigis plurlingvan broŝuron por disdoni, Esperanto estis unu el la lingvoj elektitaj. Ankaŭ okazis ke oficisto, kiu faris reklamvojaĝon al Eŭropo, iris bone informite pri U.E.A.-delegitoj kaj portante helpleterojn de la A.E.A.-Sek. Aliajn reklamojn faris la Melburna Klubo pere de magnetofona sonstrio sendita al Radio Roma kaj tie disaŭdigita en Esperanto-programo.

Multaj interesatoj skribis por plua informo, sed malgraŭ tio (plej kredible pro grandaj distancoj kaj altkosta afranko), la rikolto da modeloj transmaraj estis tre malgranda. Tamen alian sekvon havis tiuj penoj, nome ke oni disponigis al ni tute senkoste la spacon por starigi Esperanto-standon ĉe la Ekspozicio.

Ni devas konfesi ke, kiam ni unue rigardis nian lokon kaj konstatis ĝian nudecon, ni preskaŭ malesperis profiti el la dispono. Ekspoziciaĵojn por montri kaj grandan kvanton da libroj por vendi, dank' al antaŭvido de la A.E.A.-Sek., ni ja havis, sed Esperantistoj ĉie estas malriĉuloj, kaj kiel konstrui standon sen mono aŭ materialo ŝajnis problemo nesolvebla. Tamen iel komenciĝis la laboro. Iu donis al ni ligno-pecojn; starigis el niaj vicoj ĉarpentistoj; virinoj ellaboris ŝtofokovraĵojn, kaj jen preskaŭ el nenio, post 5-nokta laboro estiĝis la stando, kie sub granda signo—

"ESPERANTO, THE MODEL LANGUAGE"—

miroj da interesatoj vidis turist-broŝurojn, gazetojn kaj librojn kaj ricevis informon pri la vere internacia karaktero de nia lingvo. Samtempe estis vendata ĉirkaŭ la Ekspozicio

oficiala programo, en kiu aperis kun granda bildo de D-ro Zamenhof bona artikolo pri Esperanto, verkita de nia Prez. S-ro Ken Linton.

Pro organizado grandan dankon ni ŝaldas al la ŝajne nelacigebla A.E.A.-Sek., kiu ĉien kuris, tien kaj reen, postulante, ordonante, kritikante kaj petante. Tamen sian kutiman grumbledon li devis flankmeti kaj nur cedi al admiro pro entuziasma kaj sindona kunlaboro de multaj klubanoj, el kiu ebligis ke troviĝu ĉe la stando, tage kaj nokte dum la tuta prezentado, deĵorantoj kiuj nur bonhumore toleris la konstantajn, kvazaŭ inspektoriajn, "helpvizitojn" de la Sek.

Sekvojn tri-specajn havis la afero krom grava propagando—varbiĝis al la Klubo novaj lernantoj; pligrandiĝis la A.E.A.-kaso per vigla vendado de libroj, kaj valoran sperton gajnis la laborantoj.

Dankon al kunlaborantoj—F-inoj Calwell, A. Godfrey, E. Godfrey, Hodgkiss, Holmes; S-inoj Fierenzi, Glennie, Hanks, Hill, McKenzie; S-roj Burstin, Cohen, Crowe, Hanks, Koppel, Linton, McKenzie, Milligan.

—O. B. SERVANTO.

KLUBAJ INFORMOJ:

Melbourne Esperanto Club: Henry George Club, 18 George Parade (for de 113 Collins St.) ĉiumerkrede je la 8a. Sek. S-ro H. M. Cohen, 83 Youngman St., Preston, N.18 (Tel.: JU 3572).

Canberra Esperanto Club: "River-side", ĉiun lastan vendredon en la monato, je la 8a. Sek. S-ro N. Gamble, 27 Froggatt St., Turner, ACT. (Tel.: 688 aŭ F 04).

Sydney Esperanto Club: 12 Ennis Rd., Milson's Point (stacidomo) ĉiutage je la 8a. Sek. F-ino Edna Dash, 26 Edgware Rd., Enmore.

Brisbane Esperanto Society: Prez. S. L. Parry, Ford St., Albion (Tel. M 6097).

Okcident-Aŭstralia E-Ligo: Bacon House (ĉambro 16), 723 Hay St., Perth, ĉiun 2-an kaj 4-an jaudon en ĉiu monato (krom Decembro kaj Januaro) je la 8a.

SUBSCRIPTIONS: Mrs. Byatt, Miss Samblebe, Mr. Ottens, 12/6; Mr. Mummery, 15/-.

Australia Kroniko

PERTH: En Februaro f-ino A. Longson paroladis pri sia vojaĝo al Japanujo, kaj montris ke Esperanto multe helpis sin ĝui la viziton al tiu-ĉi bela lando.

La parolinto en Marto estis s-ro J. Hawks kaj la temo estis "Aventuro kun Fantomo". Li amuze priskribis okazajn spertitan dum vizito al Broome en la nord-okcidento.

En Aprilo s-ro A. Saar paroladis pri "Ordinaraj aferoj kun eksterordinaraj historioj." La temo interesis lin antaŭ multaj jaroj kiam li estis teknikisto en radio-stacio. Malfeliĉe s-ro Saar pasigis lastatempe du semajnojn en hospitalo, sed nun jam resaniĝis.

Ĉe la maja kunveno s-ro N. Brodie elektis la temon "Miraklo en Sablo" kaj donis ideon pri la grava rolo kiun la fabrikado de vitro ludas en niaj vivoj ho'd'au.

D-ro Einihovici donis interesan paroladon en Junio kaj priskribis provojn starigi tre bezonatan novan kalendaron.

En Julio s-ino G. Pollard estris "Libro-Vesperon" kaj en Aŭgusto la liganoj gastigis novajn studentojn. S-ino Pollard ankau pasigis iom da tempo en hospitalo, sed feliĉe grade resaniĝas. La parolinto en Septembro estis s-ro J. Hawks: temo, "Heroo-adorado".

Dum la jaro anoj kaj amikoj de nia Ligo ĝuis tri societajn kunvenojn kiam interesaj parolantoj kaj filmoj tenis nian atenton. Dum Aŭgusto kelkaj anoj renkontis la nederlandan Esperantiston A. d'Oliveyra en King's Park kaj gastigis lin per tagmanĝo kiam li atingis Fremantle-n survoje de Brisbane al sia patrolando.—N. BRODIE.

Ĉe neniu popolo estas la kredo al senmorteco pli forta ol ĉe la Keltoj. Oni povis prunte ricevi monon de ili per promeso repagi ĝin en la alia mondo. Jen bona ekzemplo por piaj kristanaj uzuristoj.—Heine.

O LIEB' (Heine).

Dediĉu vin al ĉia amo
Dum viglas via vivoflamo!
Tro baldau frostos, vintre ventos,
Kaj vi ĉe tomboj ploros. pentos.
—K. J. HIRSCHTEL.

Recezoj

"EL LA MANIKO," Originala neolara de Reto Rossetti. Eld. J. Regulo Perez, Kanariaj Insuloj. 224 p. —15/- Aŭstralia, plus afranko. Ĉe niaj agentoj.

Jen la tria libro de la entrepreno STARĖTO. La unua estis "Kvarope", kiu furore elĉerpigis vende, kaj la dua estis "La Bapto de Caro Vladimir", pri kiu oni ankaŭ diskutas pro ĝia mirakla metriko.

La rakontoj estas kvalite neegalaj; iuj atestas pri penetrema observo sur la vivo; aliaj margene evitas banalajn ĉiuj estas stampitaj el lingvaĵo mirinde trafesprima, almenaŭ por Eŭropanoj, mi ne diras la Esperantistoj entute. La petole freŝaj, piprecaj frazaĵoj estas pura frukto de l'spirito de Latinidulo, kiun kulture kaj lingve neniel influas la pensmaniero kaj koncepti-procedoj de l'orientaj homoj. Estas dubinde, ĉu esprimmanieroj plaĉaj al lingve eksperimentemaj Eŭropanoj same plaĉas al orientanoj kaj similaj, de kiuj tia lerteco eble estas nekomprenata. Ekzemple, lingvoj, kia la Angla, kiu permesas liberan verbigon de substantivoj kaj aparte-signife uzas prepoziciojn, verŝajne tre diferencas de la genio de lingvoj parolataj de centmilionoj.

Por Eŭropanoj multo da nia literaturo, inkluzive de la nune evoluigata, estas sufiĉe, se ne tute, "natura"; ni zorgu, ke ĝi estu klara ankaŭ por aliaj kiu alie trovos enigmojn en ĉiu paragrafo. La tento paradludi antaŭ niaj kun-terpartanoj estas forta por ni "blankuloj," ofte sciantaj iom pri lingvoj el branĉoj rilataj al nia propra, kaj nesage uzantaj tion per troa Okcidentigo stila kaj "aroma".

Kiel ĉe la iama skolo Budapeŝta, kies influo estas evidenta, ankaŭ iuj el la Skota skolo petolas kun imagaĵoj ekster normala deco. Tio ne helpas al ili en la kampo elektita—literaturo por ĝenerala aĉetema publiko. Esprimoj sur p. 101 plaĉas nur al homoj, kies gusto bezonas "tromaturan, putre-fortan" manĝon.

Laŭ literatura vidpunkto ni diras, ke ĝis Rossetti jam trovos temojn drame plisignifajn kaj inspire plirakontindajn, li saĝe sin ŝlosas inter la limoj de l'poezio, en kio artisma formo certgrade povas kompensi iujfojan mankon de signife originala penso.

Estas strange, ke homoj, kies majstra ekspluatemo de la lingvo riĉe ebligas al ili esprimnovaĵojn tiel vivace trafajn, tamen volas uzi neologismojn necesajn por aliaj, cetere bonaj uzantoj de Esperanto.

p. 127: Ĉu "hele flava" povas esti "senkolora"? "Gracila" signifas ne "tromaldika" (magra?) sed "svelta; eleganta, ĉarme maldika". Se "Klami" signifas nur "plurvoĉe kril!", ni suferas jam la implikojn de verba pluralo. (Homo vokas, sed homoj devas "klami"!) Sombra: en kio tiu vorto diferencas de "morna" (cetere nek-lara). Decidu mem, sinjoroj, pri la ĝustaj signifoj de "novaj vortoj" antaŭ ol flirti ilin antaŭ nia nazo.

La supra kritiko tute ne tuŝas la amuzon kaj intereson en la volumo. La ŝerca analizo de la vortludoj en Esp-o estas mirinde kontinua lertostreĉo, eble la plej ampleksa trakto jam vidita pri tiu amuza fenomeno. La subtilaj klarigoj de Prof-o Fiforkulo pri Esp-aj vortoj ne meritigas plenan kredon sed nepre ricevos la tributon de ventroskua ridado.

20, Li saltis re sur la . . . Kalocsay (Lingvo Stilo Formo 60-61) favoris okazan disigon de prefiksoj, donante ekzemplojn:—Irante ek 'La mon' ruliĝis sur la plankon dis. Atendo vana, li ne venis re. Uzante nian "liberan vortordon" do mi kantas:

Amas mi kokinojn tre vidi ovojn meti de:

lasante al legantoj ĝustan meton de la elementoj en la simplan aserton: Mi tre amas vidi kokinojn demeti ovojn.—F.R.B.

POEMARETO, aĉa aŭ plaĉa lau individua takso. Preskaŭrimoj, rimoidoj, agordoj, asonancoj kaj adasismoj supernombros purajn rimojn. Sed kelkaj strofoj impresas per sia konciza esprimeco, kaj la tuta kolekto per sia konsisto indikas la aŭtoron aminde sentema homo, al kiu la aferoj de la mondo aparte torturas per sia senracio kaj kruelo. Kontraŭ afranko nur: Joab Eliot, 2 Cambridge Street, Willoughby, N.S.W.

"LA VOJO", himno de D-ro Zamenhof, unuvoĉa kun piano-akompano. La Redaktoro sendus al petinto ekzempleron de tiu muzikpeco, por ke ĝi estu konata inter la samanaro. Por kromaj ekz. adresu al:

Y.P. Klingma, Koekoekstrat 8, Leeuwarden, Holland.

ESPERANTAJ POSTMARKOJ!
Bela fotokarto de la SEP E-aj p.m. Je modera prezo oni ricevas ilin ĉe A. Sindl, Kirchenweg, STE. POLTEN, Austria. La sepo:—Sovetio 1926, 1927. Brazilio 1936. Bulgarujo 1947. Aŭstrio 1952. Jugoslavio 1953. Aŭstrio 1954. Rabatojn pro kvanto. (Kial oni ne inkludis ankaŭ la Rusan "POPOV" de 1925?)

MIA PREĜO (Botev).

Leginte la tradukon sur p. 95, bulgara amiko Canko Murgin sendis al ni tradukon de sialandano, Ivan Dobrev. Li diris krome, ke la 100 membroj de la E-grupo Maksim Gorki en Sofio tralegis ĝue la senditan ekzempleron de La Rondo. Leteron kiu akompanis la gazeton ili uzos en speciala "letervespero".

Li aparte urĝas sendi al rusa lingvisto E. A. Bokarev, Instituto de Lingvoscienco, str. Volhonka 18-2, Moscow G 19, Esp-ajojn, ĉar tiu varma amiko nun verkas sciencan libron defende al Esp-o kaj cele al restarigo de nia afero en la USSR.

La redaktoro de L.R. volonte sendus al ĉiu petonto la tradukojn de s-ro Dobrev. Gi konsistas el sep strofoj, rimitaj.

KONTROLU VIN.

Okulojn miajn ne karesu dormo
Ĝis mi trifoje vokis al memoro
La agojn miajn de l'pasinta tago,
La paŝojn de l'piedoĵo dum la vago.

Kion mi lernis dum la disaj iroj
El viditaĵoj kaj kunulaj diroj?

Kiom gajnis mi da scio saĝa?

Kiom faris mi kun kor' kuraĝa?

Ĉu diris mi parolojn ne homindajn,

Aŭ turnis al la dev'—okulojn

blindajn?

Aŭ faris pekojn freŝajn kaj hontindajn?

Ci tia sinkontrolo estas tio,

Per kio vojon trovas ni al Dio.

Por komikgazetoj en Usono oni elspezas pli ol por la lernolibroj de ĉiuj elementaj kaj mezaj lernejoj en la lando. Alivorte pli ol kvaroble la monon difinitan ĉiujare por ĉiuj publikaj bibliotekoj en Usono. "Age" (Melb.), 3 Marto.

LINGVAJ RESPONDOJ.

Hobo en S.—Ne. Baptisto ne signifas "isto, kiu baptadas", sed "ano de la Baptista Eklezio." Parolante pri la diversaj eklezioj kaj religiaj grupoj, oni zorgu pri la ĝusta uzo de la vorto "sekto".

H.F. en A.—La sufikso -ISM estas oficiala, por teorio, sistemo, doktrino, skolo, partio, celado kaj analogaj sencoj. Ekz-e, Calvinismo, Metodismo. Ekzistas tamen multaj vortoj internaciaj (Regulo 15) en kiuj -ISM ne estas sufikso sed esenca parto de la radiko—atavismo, idiotismo, ostracismo, solecismo, optimismo, turismo k.c. Oni nepre ne forprenu el ili -ISM. Ne ekzistas **radikoj** atav', optim', ostrac' k.c. Tamen ŝajnas esti esceptoj, ĉar iuj gramatikistoj rigardus la oficialajn radikojn magnetism' kaj patriotism' kiel simplajn kunmetaĵojn de magnet' kaj patriot'. Notinde estas, ke Germanismo, naciismo, estas vaste uzataj sence de "apartaĵo de la Germana (respektive), nacia lingvo".

To ostracize: uzante nur unu vorton, eble oni povus uzi "ostracismi (iun)", ĉar la radiko devas resti integra.

L.B. en T.—Ŝajnas ke "kasisto" por nomi senpage laborantan grupanon jam ricevis "civitanan rajton" malgraŭ sia neĝusta sufikso. Eĉ eminentaj E-istoj iufoje uzas ĝin kaj similajn. Tio kompreneble ne forprenas pravecon de la severa kritiko de Lapenna en "Esperanto" (Majo 1954). Estas tamen rimarkinde, ke alternativaj formoj (kaszorganto, -tenanto, -oficulo) estas **iom pezaj**.

-IN estas evidente nenecesa, kie la sekso estas jam indikita. Ekz-e, Fraŭlino G., nia kasistino . . . (aŭ, amikino k.c.).

PLI POSTE?—Kelkfoje oni legas "pli poste", kvankam la aŭtoro volis diri "poste", ekz.: Pri tiu afero ni parolos pli poste. La kaŭzo de tiu eraro verŝajne estas, ke "poste" havas en diversaj lingvoj formon de komparativo: ekz. en la Angla: On that matter we will speak later—Pri tiu afero ni parolos poste.

"Pli poste" estas ĝuste uzata, se efektive signifas ĝi "pli poste", ekz.: Mi manĝis hejme; poste mi vizitis mian amikon kaj pli poste la teatron.

La Rondo

The Australian Esperanto Monthly

Oficiala Organo de la Aŭstralia Esperanto Asocio.

Jarkotizo: 12½\$ (aŭ 20 respondkuponoj).

Anoncoj: Tri linioj: 4\$.



Redaktoro: F. R. BANHAM, 2 Banchory St., Essendon, W.5, Victoria.

Adreso de A.E.A.—Box 2122T, P.O., Elizabeth Street, Melbourne.

Kasisto: E. McKenzie, 117 Mitchell St., Northcote, N.16, Vic.

Vol. 12, N-ro 69.

MELBURNO.

Oktobro-Decembero, 1955.

LETTER TO A SCIENTIST.

You say that "scientists known to you can read scientific articles in French, Spanish, &c., more easily than in Esperanto."

They may, certainly, if they have thoroughly learned those languages and do not know Esperanto. We doubt, however, if you mean this. There is an implication that men with even a smattering of the aforesaid languages can gain a superficial meaning of a text in them better than from an Esperanto text.

The fact is that no one can read and understand a language without first having learned it. Your scientists, unless they are perfectly familiar with the foreign language, would seem to be acting unscientifically, for they must, by the nature of the case, be relying largely on guess-work. That's dangerous. The nouns in a scientific article in any Romanic language, and probably the more frequent verbs, may be in the main recognisable. But what of the other grammatical elements—subtly-modifying particles, &c. — as they blend together in sentences having forms and sense governed by the peculiar properties of the languages concerned?

Esperanto, while not superficially obvious in meaning at first sight to one who knows nothing of it, is easier to learn and a more precise instrument of expression in the hands of those who have learned it than a foreign language learned at five times the cost, or one of the so-called "naturalistic" I.L. projects like Interlingua or Interlingue. Esperanto is

an agglutinative language, and as such relies for its expression largely on accurate use of some 30 affixes, which give it amazing flexibility and range. By its ability to form almost infinite word combinations, Esperanto saves the learner the necessity of memorising thousands of separate stems. If a root word is not known to, or forgotten by the user, he can readily coin a compound of his own that serves equally well, e.g., "tempomezurilo," "horindikilo," instead of "horloĝo"; "purigi per fluaĵo," instead of "lavi"; "forte aŭdebla," "bruaŭdebla," for "laŭta".

A Turk or Tibetan might well prefer varmomezurilo to termometro; okulsenco to oftalmologio; terscenco to geologio; birdkulturo to avikulturo; birdscenco to ornitologio. Many English Esperantists would prefer to see tertremego than megaseismo; akvotimo than hidrofobio; akvakapa than hidrokefala.

If all men, of all grades of culture and education, have an equal right to an interlanguage, the above character of Esperanto, with its accompanying simplicity and regularity, is a prime factor in making that right a real possession.—F.R.B.

PAUL NYLEN, 85.

One of the very few surviving visitors to the First Esperanto World Congress, at Boulogne in 1905, Swedish veteran Paul Nylén, is still working for the movement. Born 1870, he is regarded as the oldest European Esperantist, having joined in 1892.

PROBRAJOJ DE LA TRADUKARTO.

Brendon Clark.

Dum miaj studentaj tagoj mi tradlegis franclingve la romanon "Colomba", de Prosper Merimee. En tiu tempo mi jam studis la francan lingvon sep-ok jarojn kaj legis sufiĉe flue. Tamen "Colomba" ne multe interesis min kaj postlasis en la memoro nenium restaĵon. Dekses jarojn poste mi denove legis ĝin, en Esperanto.

Mi relegis ĝin kun streĉita atento; la intrigo fariĝis klara, la lokoj sin prezentis kvazaŭ realaj. Eĉ hodiaŭ, post kelkaj jaroj, mi ankoraŭ memoras iujn el la scenajoj.

Kial la Esperanta traduko tiel efikas sur min? Supozeble pro tio, ke mi pli bone komprenis Esperanton post du jaroj da studado, ol mi komprenis la francan post ok jaroj; ke legante franclingve mi nerimarkis diversajn nuancojn kaj subtilaĵojn kiujn tamen mi ĝuste ŝatis en la Esperanto; ke pro la precize laŭsenca esprimomaniero de Esperanto mi ne povis miskompreni. Sed antaŭ ĉio, mi kredas, ke Esperanto tiel efikas pro tio, ke ĝiaj radikvortoj estas malmultaj, kaj sekve bone konataj laŭ pro unu ĝusta senco . . . ili ne konfuzas pro troa diversigo de signifo. La vortoj de la naciaj lingvoj iom similas al la ŝtonetoj de maro au rivero; pro longa ruliĝo ili fariĝis tro glataj, tro mult-erecaj kaj sen-signifaj; ili siblas kaj susuras, sed nenion diras. En Esperanto la vortoj estas nove naskitaj, individuaj, energiaj pro abunda vivo. . .

Flue legante Esperantan tradukon, iuj ofte asertas, ke ili sentas legi, ne Esperante, ne propralingve, sed en la lingvo de la aŭtoro. Certe, tiel estas ĉe mi. La unua tradukaĵo kiun mi legis, estis la "Hungara Antologio." La noveloj ravis min. Tiel vibre mi interesiĝis, ke baldaŭ mi ne konsciis pri tio, en kiu lingvo mi legas. Ĉu Esperante? Ĉu angle? Ĉu hungare? Mi sciis nur, ke mi legas. Sajne hungare, kvankam mi komprenas eĉ ne unu vorton de tiu lingvo. Tamen mi partoprenas la menson de la aŭtoro. Kiel li pensas, tiel ankaŭ mi. Portempe, mi estas hungaro. Mi parolas hungare, mi aŭskultas hungare, mi pensas hungare. Tutsimile

mi legis itale, kiam mi legis "Pinokjo"; japane, kiam mi legis "Verda Majo"; portugale, kiam mi legis "Rui Barbosa"; norvege, kiam mi legis "Kon Tiki". Kaj mi ne havas tiujn lingvojn. La fenomeno povas okazi en aliaj lingvoj, sed ne tiel forte. Ekzemple, anglo kiu legas anglan tradukon de Alexandre Dumas povas supozi portempe, ke li estas franco; sed ne, ke li legas en la franca lingvo. Li ne dubas pri la lingvo, ĝi estas lia propra, kaj eble la sola, kiun li havas. Sed kiam li legas Esperanton ni konscias, ke ĝi estas lingvo alia ol nia, kaj sekve ni pli facile forgesas ĝian identecon. Se la aŭtoro estas ekzemple hungaro, ni des pli volonte supozas, ke ni legas hungare. De la vidpunkto de la tradukanto mem, li trovas en Esperanto multe da vortoj kiuj troviĝas ankaŭ en lia lingvo; krom tio, danke al la akuzativoj kaj la pluralaj adjektivoj, oni povas konstrui Esperantajn frazojn laŭ diversaj formoj. Sekve li povas iom reteni en la Esperanta traduko la kadencojn de sia denaska lingvo, kaj tamen verki belan Esperanton. Tiuj punktoj ĉiuj kombinas por krei la iluzion, ke oni legas en la lingvo de la tradukinto; kaj tiu kutime estas samnacia, ne kun la leganto, kiel okazas ĉe aliaj tradukoj, sed kun la aŭtoro mem.

Ĉar Esperanto estas tre logika lingvo, oni tradukas laŭ la signifo de la originala frazo, kaj ne nur laŭ la vortoj. Pro tio, oni konstante analizas la sencan de sia nacia lingvo, kaj tiumaniere ĉiam pli bone komprenas ĝin. Iufoje mi pli facile komprenis la Esperantan tradukon, ol la anglan! En la "Statistika Resumo de Brazilo por 1946" mi trovis du anglajn esprimojn kiujn mi ne certe komprenis: decennial groups kaj jerked beef. Mi turnis min al la Esperanta traduko kaj trovis—jardekaj grupoj, kaj sekviando!

Antaŭ dek jaroj profesoro de modernaj lingvoj en mia urbo asertis en prelego, ke artefarita lingvo "kia Esperanto" ne povos sukcesi internacie, pro tio, ke oni nepre uzos, senpripense, nekompreneblan nacian idio-tismon. Ĉe neesperantistoj tiu konkludo sonas logika; sed mi sciis, ke en pli ol 600 komunikaĵoj de prok-

simume 40 landoj mi neniam trovis ian nekomprenoblajn. Tamen inter miaj korespondintoj estis kelkaj iom nekleraj. Do, kial il'aj skriboj restis ĉiam kompreneblaj, eĉ malgraŭ gramatikaj eraroj? Evidente pro iu principo en la lingvo mem. Fine mi kredis trovi tiun principon: En Esperanto ekzistas nur kelkcentoj da radikaj vortoj, kaj preskaŭ ĉiu havas nur unu solan sencon. El tiuj kelkcentoj la korespondanto ĉerpas nur tiujn, kiujn li mem bezonas, kaj tiujn li uzas tiel ofte, ke tre frue li tute konas ĉiun vorton kaj ties ĝustan signifon. Sekve en letero li ne povas misuzi vorton. Nelogika idiotismo en nacia lingvo farigas memevidenta senencaĵo en Esperanto, aparte kiam oni bone konas la Esperantajn vortojn. Ja povas erari komencanto, tradukante verkon de iu alia, kiu kutimas uzi aliajn vortojn kaj aliajn esprimadojn—sed la tradukarto ne estas por komencantoj.

Jen problemoj kiu estas eble unika ĉe Esperantistoj, nome: kiam homo elpensas proprajn ideojn kaj esprimas tiujn ideojn per propraj vortoj, la verko estas originala, ĉu ne? Tamen, ni supozu ke aŭtoro verkas artikolon en la nacia lingvo kaj poste esprimas la samajn ideojn, frazon post frazo, en Esperanta artikolo. Laŭ unu vidpunkto li tradukis sian originalan verkon en Esperanton, tiel ke la Esperanta formo estas tradukaĵo; laŭ alia vidpunkto, ankaŭ la Esperanta artikolo estas lia originala verko. Li ne kopiis aŭ tradukis la verkon de iu alia, sed mem elpensis kaj verkis ĝin.

La problemoj povas esti grava. Ekzemple, antaŭ kelkaj semajnoj mi mem verkis anglalingvan artikolon pri Esperanto. Kiam mi serĉis temon por ĉi tiu konkurso, eniris en mian cerbon la penso, uzi la anglan verkon, kiu ankoraŭ ne foriris al ĵurnalo. Sed mi dubis, ĉu oni povus nomi ĝin originalaĵo, aŭ tradukaĵo; do mi ne uzis ĝin. Tamen se oni nomus "originala Esperanta verko" nur tiun, kiun oni elpensis Esperante (ekzemple ĉi tiun), tio tiel efikus, ke oni ne povus prezenti verkon por konkurso se oni unue prove verkis ĝin en la propra lingvo. Kaj tia regulo, kvankam bona povus esti tro limiga, kaj malfacile kontrolebla. Ali-

flanke, se mi sendus al nacia ĵurnalo anglan formon de ĉi tiu Esperanta artikolo, ĉu oni pagu min kiel aŭtoron aŭ kiel tradukinton?

(La supra artikolo gajnis la prozan premion de Masel. Ĝi estas iom mallongigita.—Red.)

PRI NIA LITERATURO.

El longa artikolo en "Amerika E-isto" pri la ĝenerala E-literaturo, ni citas vortojn de la aŭtoro, D-ro W. Solzbacher:—

"La plimulto de la E-aj redaktantoj kaj recenzantoj estas amatoroj, kiuj neniam okupis similan postenon en nacilingva eldonejo. Ili laboras senpage, ofte eĉ subtenante la gazeton el propra poŝo. Ili avide kolektas E-ajojn kaj ŝatas havi plenan kolekton de ĉio, kio estas presita en E-o. Tio kondukas al la stranga regulo ĉe multaj E-gaz. — 'Duope ricevitajn verkojn ni recenzas; unuope ricevitajn ni nur mencias'. La decido, ĉu verko meritas recenzi, do ne dependas de la redaktoro kaj de la verko mem, sed nur de la ricevo de du ekzempleroj.

"Mi konas nenium nacilingvan gazeton aŭ revuon, kiu havas tian regolon. Grava verko estas recenzata, eĉ se la redaktoro devas aĉeti ekzempleron. Malgrava verko nenium atenton ricevas, eĉ se cent senpagaj ekzempleroj alvenas al la redaktoro kaj liaj recenzantoj. Honestaj, malkaŝaj, kompetentaj kaj kritikaj recenzoj, insista varbado por l'broj altkvalitaj, nemencio de malgravajoj decas esti principoj de la E-gazetaro.

"Pli ol 70% de la E-literaturo konsistas el lernolibroj, vortaroj kaj propagandaj broŝuroj nacilingvaj. La cifero estus eĉ pli alta, se oni konsiderus la nombron de la ekzempleroj penetras en novajn rondojn kaj altiras lernantojn. Tamen ĝi signifas, presitaj. Tiu fakto indikas, ke E-o ke la nombro de nur-Esperantaj verkoj estas ne pli granda ol tri mil . . . ankaŭ, ke ekzistas inter ni tro multaj 'eternaj komencantoj', kiuj neniam finlernas la lingvon.

"Pri la faka kaj scienca literaturo, ne la kvanto sed la kvalito prezentas problemojn . . . Severe sciencaj verkoj pri ekonomiaj kaj sociologiaj temoj, kiuj respegulas la nunan sta-

ton de tiuj sciencoj en ĝiaj esencaj trajtoj, ĝis nun ne ekzistas. Natursciencaj verkoj en E-o estas ĉefe popularsciencaj. Sciencisto ne lernos E-on por legi tiajn librojn, sed nur se la lingvo permesas al li legi kaj publikigi la rezultojn de novaj sciencaj esploroj. Tio evidentiĝas la gravecon de E-resumoj en sciencaj gazetoj. Ili ankoraŭ ne estas multnombraj sed oni devus pli bone utiligi kaj diskonigi tiujn, kiuj ekzistas.

“La problemo ne plu estas la ‘pliriĉigo’ de la E-literaturo laŭ kvanto, aŭ la ‘havigo de interesaj legajoj al la E-istoj’”. Legindaj libroj jam estas pli multnombraj ol eĉ la plej entuziasma E-isto povus legi dum sia tuta vivo. La problemo estas eduki la E-istojn, ke ili aĉetu pli multe da libroj, ne nur por pliboniĝi en E-o, sed ankaŭ por rikolti kelkajn el tiuj kulturaj, sciencaj kaj praktikaj valoroj, pri kiuj ni tiel ofte parolas en nia propagando.

“La dua problemo estas, trovi metodojn por publikigi E-librojn, kiuj montros la utilecon de la interlingvo kiel perilo inter naciaj kulturoj kaj kiel helpilo de internacia kunlaboro en ĉiu grava fako. Estas evidente, ke kelkaj el tiaj libroj ne povas esti financataj el la vendoprezco. Ili bezonas eksteran monsubtenon, kiel multaj sciencaj kaj fakaj verkoj en nacia lingvo bezonas ĝin. Tia monsubteno eble estus trovebla, se ekzistus plano praktika kaj konvinka.”

Australia Kroniko

PERTH: En Oktobro S-ro A. Walker, kiu dum la pasintaj monatoj suferis pro artritro, afable daŭrigis priskribon de siaj biciklaj vagadoj tra Eŭropo antaŭ la lasta milito. Kun intereso ni sekvis lin tra kelkaj eŭropaj landoj ĝis la Berna kongreso, kiun li partoprenis en 1939.

27 Septembro kelkaj anoj kunvenis en Kings Park por tagmanĝi kun la familio N. Gamble, kiu, reveturante de Eŭropo al Canberra, mallonge restis en nia urbo. Bedaŭrinde la ŝipo “Largs Bay” malfruiĝis kaj la familio Gamble ne povis renkonti niajn anojn eĉ la proponita tagmanĝo. Tamen, poste ni kontaktis ilin kaj la saman vesperon ĉirkaŭ dekduo renkontis ilin en nia klubĉambro kaj

vespermanĝis en la hejmo de f-ino O. Strempele.—N. Brodie.

BRISBANE: Antaŭ unu jaro nova regulo de la Brisbana Societo forigas nebonan malnovan kutimon laŭ kiu, lernonto aĉetinta lernolibron povus samtempe aĉeti Esperanton insignon. La nova regulo postulas ke antaŭ ol fariĝi ano de la Societo, kaj meriti la insignon, lernanto suhmetiĝu al elementa ekzameno kies celo estas certigi ke kandidato povu kaj kompreni kaj sin komprenigi en la lingvo.

S-roj K. R. Bayliss kaj G. A. Grant, sukcesis, kaj el la manoj de la Prezidanto ricevis la Stelojn donace de la Societo. Ĉi tiu ceremonio okazis dum konversaci-vespero en la hejmo de Majoro kaj S-ino S. Beck, Herston, Brisbane.

MELBOURNE: Interesplenan vojaĝon, kvankam nur image, ni faris en Junio, kiam F-ino Cox alparolis la Melburnan Rendevuon pri “La Insulo Malta”. Si faris pasintjare vojaĝon tra Eŭropo kaj ankaŭ vizitis la insulon. Pere de lumbildoj ŝi montris al ni historiajn vidindaĵojn de tiu bela insulo.

El la vasta ekrano de la naturo, S-ro E. Hanks ĉiam povus eltiri materialon por interesi la klubanojn. En Julio eĉ la “Rendevuo” li prelegis pri “Wyperfield National Park”, zono en la ne malproksima “Mallee”-regiono, kie oni estigis rezervejojn por protekti la naturajn vegetaĵojn. S-ro Hanks mem estas unu el la kuratoroj de tiu -ĉi parko, kies celo ne nur estas la konservado de ŝajne malaperantaj specoj, sed ankaŭ ebligati al sciencistoj kaj naturamantoj studon de naturaj karakterizaĵoj. Kiel kutime, belajn lumbildojn li montris kaj interesan informon li donis.

Pri la iama vivo de la Nord-Amerikaj Indiĝenoj (“Indianoj”) paroladis s-ro E. McKenzie en Aŭgusto. Multflanka estis la iom primitiva, tamen ne tute sencela nek mallaborema ekzistado de tiuj inteligentaj homoj.

En la septembra “Rendevuo” D-ro Fred Williams parolis pri “Esperanto por la Kolektanto”. Li skizis la valoron de facila interlingvo por ĉiuj specoj kolektado. D-ro Williams mem montris al ni albumon de ilustritaj poŝtkartoj de Esperantistoj el preskaŭ ĉiu lando.

Novalveninta dana E-isto, Verner Rolding, estis la parolanto en Oktobro. S-ano Rolding estas specialisto en la teksaj-industrio kaj spertulo de la M.T.M. (Mezuro-Tempo-Movado, angle Measure-Time-Motion) sistemo de plej efika produktado. Bedaŭrinde, lia lingvo konsistis ĉefe el signoj kaj ciferoj de spertuloj. Tamen li sukcesis montri al ni kiel konservado de spaco kaj energio povas rapidigi laboron kaj pligrandigi la produktadon de ĉiu firmo tute sen ekspluato al laboristoj. La temo tiel interesis la ĉeestantojn, ke s-ano Rolding faros duan prelegon ĉe la merkreda klubkunveno.

Nova, vigla kaj orel-plaĉa parolanto en Novembro estis ukraina s-ano S. Stepanov. Afero pri kiu li fieras pli ol pasporto de iu ajn lando, li diris, estas membro-karto de U.E.A. Lia rakonto pri kiel li aliĝis al la E-movado tenis la atentostreĉon de ĉiuj ĝis la fino—F.K.

10-A TUT-AŬSTRALIA ESPERANTO-KONGRESO.

Letradreso: Canberra Esperanto-Club, 71 Miller St., Canberra. La kongreso okazas oficiale de la 2-a ĝis la 8-a de Januaro, sed samidcaoj, kiuj jam estos pli frue en Canberra, povos partopreni je Novjara Festo, kiu okazos ĉe "Riverside Kultura Centro" je la 31-a de Decembro.

La Kongres-Komitato enskribis kiel "Honoran Membron", S-ron W. J. Drummond el Melburno, kiu estas la sola vivanta Esperantisto, kiu partoprenis la unuan Aŭstralian Esperanto-Kongreson en Adelaide en la jaro 1911.

Afable aliĝis kiel Patronoj:

S-no G. Pollard (Perth) £4

S-no A. Groeneweg (Toowoomba, Q'ld.) £2/2/-

D-ro Fred Williams (Melbourne) £2/2/-

4-a Listo de Aliĝintoj:

62. S-ro A. Feldmayr (Sydney)

63. S-no A. Feldmayr (Sydney)

64. F-no Feldmayr (Sydney)

65. F-no J. Feldmayr (Sydney)

66. S-ro I. T. Maddern (Wodonga, Vic.)

67. S-ro Hartman (Sydney)

68. S-no Hartman (Sydney)

69. S-ro E. Crowe (Melbourne)

70. F-no A. Curtis (Beenleigh, Q'ld.)

71. F-no D. Dugdale (Adelaide)

72. S-no M. Morrison (Adelaide)

73. S-no E. Pearce (Adelaide)

74. F-no E. Bull (Perth)

75. S-ro T. Perry (Sydney)

76. S-no T. Perry (Sydney)

77. S-ro R. Asselin (Sydney)

78. S-ro F. Mueller-Sorau (Sydney)

79. S-ro E. Barber (Sydney)

80. S-ro E. McKenzie (Melbourne)

81. S-no E. McKenzie (Melbourne)

82. S-no V. Williams (Brisbane)

83. S-ro G. Grant (Brisbane)

84. Dr. Fred Williams (Melbourne)

85. S-no A. Groeneweg (Toowoomba, Q'ld.)

86. S-no G. Pollard (Perth)

87. S-ro H. E. M. Flinn (Canberra)

88. S-ro B. G. Gill (Sydney)

89. S-ro E. E. Thompson (Melb.)

90. S-ro W. J. Drummond (Melb.)

Ciuj kongresanoj estas petataj ĝustatempe skribi al la Kongres-Komitato kaj indiki daton kaj horon de sia alveno (ĉu per fervojo, aŭtobuso aŭ aeroplano), por ke komitatanoj povus atendi kaj gvidi vin. La privataj telefon-numeroj de la prezidanto kaj de la sekretario estas: S-ro Harry Torr J 1591, S-ro Noel Gamble J 2688.

La detalan kongres-programon vi ricevos kune kun via Kongreskarto en la kongresejo, kiu estas la "Riverside Cultural Centre".

THE MOVEMENT "IS" MOVING.

The first of two volumes of a magnificent all-Esperanto dictionary has just been published by Senor F. Azorin in Mexico. The Esperantist Scientific Association, with 400 members in 17 countries, has issued a series of lectures in E-o, and others will follow. In Sweden Dr. F. Szilagyi edits "Norda Prismo," a cultural review. The first number of La Nica Literatura Revuo, headed by Prof. G. Waringhien, is now in readers' hands. In January "Pedagogia Revuo" will appear. "Scienca Revuo" invites subscribers. In Britain a sociological magazine is being planned. "Teknika Terminaro" will be ready at the end of the year. A "Militista Vortareto" in five languages (inc. Esperanto) is just published by the U.E.A.

And, the first member-subscriber in the Soviet Union since the "curtain" fell many years ago has paid his subscription to the Universal Esperanto Assocn.

NORMA KLERECA DIPLOMO.

Dr. Cyrus J. Caldera, of Armadale, W.A., has passed with honor the highest examination in Esperanto held in Australia—La Norma Klereca Diplomo, part B.

The task is in three sections—the first he successfully overcame some time ago; in the second, the subject of this report, he achieved an honors pass, the standard being of the academic level of an undergraduate after one year at university.

The B section just completed comprises three questions in grammar, one verse and five prose translations from different fields of composition, an essay on style, five questions on Esperanto literature and six on its history.

Section C, the oral part, has yet to be arranged.

Judges were Rev. C. C. Cowling, Mrs. P. Hanks and F. R. Banham.

The candidate handled the language efficiently, and by his diligent research and studious observation is manifestly a competent scholar in the field of criticism. Much of his analytical work was excellently documented and in the translation from belles-lettres he revealed a mind that clearly grasped the issues of a subtly expressed passage on Beauty and the Poetic Principle.

His essays on the style of Baghy, Szilagyi and Shidlovskaja and his exposition of the literary evolution of the language could, with certain expansion, serve as useful monographs on the subjects. We congratulate this candidate on his worthy success in a difficult field of testing, and trust that others will essay the same task.

NORMA ELEMENTA DIPLOMO.

Mrs. A. B. Sedgley, of Wembley Park, W.A., has succeeded with honor in each part of the examination for the Normal Elementary Diploma. She therefore may use the title with her name. She is the first winner of an Australian diploma in Esperanto. We heartily congratulate her on this happy occasion.

HAVELOCK ELLIS PRI INTERLINGVO.

"It has become one of the chief tasks of science to attain unity, unity of standard and measure and nomenclature; this has been the object of numberless conferences. It is to attain this end that the efforts to manufacture a universal language have obtained some support, fruitless as they hitherto have been. It was by some wholesome instinct that men clung to Latin as the universal language of educated Christendom; the humanising intercourse, which by means of a common language broke through the barriers of race, forms one of the most charming features of the early Middle Ages. The equally wholesome instinct of individual development has intervened, but the other again becomes dominant, and the universal language becomes more and more inevitable every day. Around it will centre the chief struggle and the chief triumph of the human spirit." (Introduction to "The New Spirit", 1890.)

Jam fariĝis, ke unu el la ĉefaj taskoj de la scienco estas atingi unuecon de normoj, mezuroj kaj nomoj; sennombraj konferencoj pritraktis tiun demandon. Por atingi tiun celon, kelka subteno doniĝis al la diversaj provoj fabriki universalan lingvon, malgraŭ ilia ĝisnuna senfrukteco. Pro sana instinkto homoj tenadis al la Latina, kiel la universala lingvo de kleruloj en kristanaj landoj. Tiu humaniga interrilatado, kiu, pere de la komuna lingvo, rompis tra la baroj de la rasodiferenco, formas unu el la plej ĉarmaj karakterizaĵoj de la frua mezepoko. La egale sana instinkto de individua disvolviĝo intervenis, sed la alia denove fariĝas reganta, kaj kun la paso de ĉiu tago montriĝas pli klare, ke nepre venos universala lingvo. Ĉirkaŭ ĝi centriĝos la ĉefa lukto kaj la ĉefa triumfo de la homa spirito.

HANS ANDERSEN.

Okaze de la 150-jara nasktago de la Dana fabelisto ni ricevis tre bonan artikolon pri li, verkitan de Sven M. Kristensen. Ĝi venis per la Dana Konsulo en Sydney. Bedaŭrinde la artikolo estas tro longa por nia eta

gazeto, kaj mallongigo detruus ĝian efikon. Ni prenas la okazon varme instigi legantojn preni intiman intereson en la Esperanta traduko de la Fabeloj—legu kaj relegu ilin! Ekzistas biografio de H. C. Andersen en Esperanto—aŭtoro C. Heilskov.

MEMKRITIKO.

En internaciaj kunvenoj (kongresoj, feriaj semajnoj k.t.p.) konsternas la granda procento da partoprenantoj, kiuj apenaŭ balbutas E-on, eĉ tute ne konas ĝin; inter ĉi tiuj la "turistoj", kiu profitas la ĝenerale favorajn kondiĉojn, laŭdas la internacian lingvon—en nacia lingvo—en la konversacioj devigante la aliajn imiti ilin, tiel farante terure fuŝan "koktejlon" de naciaj idiomoj!

Estu organizita vasta kampanjo por vere E-igi la E-istojn. Sukcesinte en tio, vi povus prezenti al eksteraj institutoj ion, kies kvanto kaj kvalito egalas unu la alian. Nune, ĉe la organizitaj E-istoj, ni devas objektivite noti, ke granda parto el ili konsistas el eternaj komencantoj"; alia parto el simplaj simpat'antoj, krome parto el veraj komencantoj, kiuj restos kunlaborantoj—eble. La eteta cetero konsistas el gvidantoj kaj aktivaj membroj, kiuj ja estras la lingvon mem.—Laŭ "Svisa Espero".

"OUTBACK."

Ĉu la redaktoro aŭ iu alia leganto kapablas doni al mi bonan tradukon de la esprimo "Outback"? Vere tiu ĉi vorto tute ne estas bona angle, sed mi trovis ĝin en la ĉijaraj ekzamena-paperoj de la "Pyke-Ekzameno". "Outback" ne estas komprenata de Angloj, Kanadanoj, Sud-Afrikanoj kaj Usonanoj ĉar ĝi estas vera aŭstralia esprimo. Ĉu tial inkluzivi ĝin en ekzameno por komencantoj kiuj lernis Esperanton dum malpli ol jaro??—Herbert Koppel.

"OUTBACK" estas ne nur Angla vorto, sed ankaŭ aparte kaj familiare Aŭstralia. Ĉiu Aŭstraliano bone scias, aŭ devus bone scii, ĝian signifon, negative, ĉu li lernis Esperanton dum unu jaro, aŭ neniam. Bonvolu serĉeti en vortaro Angla.—Red.

LA ESPERANTAJOJN KOLEKTANTA INTERNACIA KLUBO—E.K.I.K. fondiĝis Nov. 1953 kun celo

atentigi la E-istaron konservi de perco la div. E-ajojn en kolekta formo. Ĝi havas 50 aĵojn en 17 landoj. Aligkosto estas 4 resp. kuponoj; senpaga E-glumarka katalogo. An-kotizo—3 r.k. Ĝi eldonas glumark-stamp-katalogojn. La lasta listigas 120 diversspecajn E-kongresajn stampojn. Gazeto: "La Glumark - kolekta". Prez. G. Saget havas 3800 div. E-glumarkojn. Du membroj kune posedas la 120 div. E-stampojn. Mi, la fondinto, posedas 2250 div. E-glumarkojn. Mi petas, ke oni sendu al mi ekz. de E-glumarkoj kaj E-kongresaj insignoj, por kompletigi mian katalogon.

—Louis Obrecz'an, Box 51, Waterman, Pa., U.S.A.

Recenzoj

"KOKO KRIAS JAM!" Originala novelaro de Ferenc Szilagy. Eld. J. Regulo, La Laguna, Kanariaj Insuloj. 232 p. 14/6 Aŭstralia, plus sendkosto.

Jam de la debuto de Szilagy per lia "Trans la Fabeloceano" (1932), rimarkinda prozokolekto, la E-istaro pli kaj pli intimiĝis kun la sentema spirito kaj observanta menso de tiu ĉi elstara figuro en nia literaturo, belarto kaj pedagogio. Homo de dukultura fono—Hungara kaj Sveda—li transmetas la pensojn kaj fantaziojn kvazaŭ tra du prismoj, kio iufoje donas al ili aparte impresan esprimformon. Plene ŝati liajn ofte subtilan simbolismon kaj naturajn analogojn ne estas plezuro, kiun senpene ricevos supraj pensantaj homoj. Iuj lebantoj kontente legos la simplajn rakontostrukturetojn, ne komprenante ilian profundon, la bele instruajn lecionojn pri la vivo, kiujn la artisma verkanto volas prezenti al sia publiko.

Estus neĝuste kaj nejuste nomiti aŭtoro maltrafo—nesukceso de principoj de l'arto kaj esprimmedio. Koscienca literato ne sin permesas mallevi sian kreemon kaj interpretadon ĝis la nivelo de la meza inteligento, sed, kiel Szilagy, penadas, per kolorbildo el imaga mondo, plifortigi la spiritan vidpovon latente dorme-

man en ĉiu normala homo. La pura literato neniam laciĝu en la pliprofundigo kaj pilargiĝo de sia kulturo, kaj li ne kaŝu la akiraĵojn, eĉ se iuj akuzos lin pri "snobismo".

La temaro estas vastgama; la lingvaĵo freŝe originala. Ĝia flutrafa ideesprimemo atestas pri familiaro kun E-o kiel ĉiutaga parolmedio. Nur tie-tie linio ĝenas: 44: "Ĝis plue la salamandro ne estis ĝenata". Kial "La s. ne plu estis . . ." aŭ, "De tiam la s. ne estis plu . . .?"

El la riĉa enhavo ni mencias nur: Brila bildo el la vivo de Henri Dunant, fondinto de la Ruĝa Kruco. Denove vivecas la figuro de la sentema Sviso, kiu ĉe la sanga Solferino devis fronti gravan decidon—elekti la vojon de l'memamo aŭ tiun de l'altruismo.

La dua parto prezentas, tolere, bonhumore, bildojn el la E-a vivo Rakontoj per kiuj la aŭtoro liveras fruktojn de sia longa multifaceta konado de E-aj tipoj. Li povus verki libron de anekdotoj, skizoj, karakteraj portretoj kaj pikantaj pensoj pri Verdulaj individuoj simile al "Notlibro de Praktika Esperantisto" (Sturmer, 1932). Dotitaj homoj, hazarde metitaj en situacio aparte favora, havas moralan devon verkiste konservi por la posteuloj la personan panoramon de l'pasinteco, kaj la ofte stranganj historiojn, kiuj enkrustiĝis ĉirkaŭ nia literaturo.

La nivelo altkvalita de ĉi-serio neniel malleviĝis per la nuna libro. Ĝi estas valora tenujo de legindaj observoj kaj vivaj bildoj, delikate tamen firmstreke ĉizelitaj de majstra mano. Amantoj de la bona prozo, de la karakterana analizemo, de la intelekta plezuro, subtenu indan entreprenon per viaj mendoj.—F.R.B.

MANUEL D'INITIATION: Unua lernolibro for Franclingvanoj, de Bernard Thaillet. Eldonis EDITIONS NOVA, Esperanto - Fako, Mulhouse, France. Kvar resp. kuponoj.

La unua de okvolumeta serio, tiu libreto ebligas facilan lernadon de la bazo de E-o sen instruanto. Apartan atenton oni donis al la prononco, kaj celas ebligi legon, skribon kaj parolon en kelke da semajnoj.

Oni preskaŭ tute ne plu trovas E-lernolibrojn kaj aliajn E-librojn en

librovendejoj. La tekniko de la librovendado de post la unua mondmilito radikale ŝanĝiĝis. Vendistoj ŝatas nur tiujn librojn, kiuj rapide kaj grandkvante vendiĝas. Tial la paradoksa situacio restas, ke nune, kiam la E-literaturo estas grava kaj ampleksa, la ĝenerala publiko havas malpli grandan ŝancon vidi E-librojn ol en la tempo, kiam la vendistoj montris ilin fenestre kaj vendotable.

Por Francoj, la fama eldonejo "NOVA" kuraĝe penas solvi la problemon, eldonante librojn E-ajn en serio de popularaj kompletejoj.

Ĉiu Franclingvano saĝe aĉetus tiun 64-paĝan meminstruilon, tiel profitigante al si, kaj pravigante la fidon de inda entrepreno.

PYKE RESULTS.

Prize: Mr. G. A. Grant (Brisbane), 86 points. Certificate: Mr. F. Mueller-Sorau (Sydney), 72 pts. Ten entered. Report follows, next number.

CLUB ADDRESSES.

Melbourne E.-Klubo: 18 George par., off 113 Collins st. 8 p.m. Wednesdays.

Canberra E.-Klubo: 27 Froggatt st., Turner, A.C.T.

Sydney E.-Klubo: 12 Ennis rd., Milsons Point, Thursdays.

Brisbane E.-Soc.: S. L. Parry, Ford st., Albion.

Okt.-Aust. E.-Ligo: 723 Hay st., Perth, room 16. See Melbourne telephone book under "Esperanto!"

STOP PRESS.

No. 91. Mr. S. Fulop (Canberra).

No. 92. Miss E. Chandler (Perth).

Enrolments according to States:—

New South Wales	31
Victoria	28
South Australia	11
Australian Cap. Ter.	8
Western Australia	5
Queensland	4
Tasmania	3
New Zealand	1
Switzerland	1

Total 92